

1983 junio
76a jaro
n-ro 930 (6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



La urbestro de Vankuvero
invitas al la 69a UK
venontjare en Kanado

Vi trovos,

ke ni denove ignoris la ricevitaĵajn informojn, ke ses meritoplenaj, multjardecaj esperantistoj (kun suma aĝo de 522 jaroj), kiuj konsistigas eventuale vian Esperanto-klubon, kunvenis por festi la 80an datrevenon de unu el tiuj membroj. Pardonu pro tiu ignoro! Fakte, havante mem pli ol duonon de tiu atentinda aĝo, ni ja plenas je respekto por tiuj pioniraj disĉiploj de Zamenhof, kiuj vivtenis la lingvon kaj la Movadon tra la pasintaj jardekoj. Tamen, tri novaj lernantoj en Ruando, kvar junaj entuziasmoj en Kolombio kaj naŭ korespondemuloj en Irano por ni ĉiam pli gravas, ol dudeko da lumbildaj preleĝoj en 80-jara kaj 8-membra eŭropa Esperanto-klubo. Tial emfaza atento al la kreskanta movado en Afriko ĉi-numere. Cetere, pardonu, ke ni venigas al vi ĉi tiun numeron, antaŭ ol vi sukcesis finlegi la antaŭajn du, kiuj venis lastatempe. Ni provos fari la samon pri la venonta numero. Legu tial rapide, sed ja atente!

Enhavo

- 101 Afriko: Por doni sencon al nia propra esperantisteco (sm)
- 102 Prof. Knappert donacas svahilan vortaron
- 103 Kio okazas en Ebura Bordo? (Gilles Wallez)
- 104 Dek parolantoj kontraŭ unu ministra deklaro (R. Corsetti)
Landa agado: Bonaj perspektivoj de la korea movado (G. Sutton)
- 105 Nova generacio ĉefrolas en Germana Esperanto-Asocio
- 106 Koresponda universitato: Mankas konvinkaj argumentoj (Bruce Arne Sherwood)
- 107 Björn Collinder 1894-1983 (Karl Söderberg)
- 108 Buĝetpropono de Universala Esperanto-Asocio por 1984
- 109 Parlamenta agado: Utile en Strasburgo, sukcese en Bruselo
- 110 Turismo: Okazos kadrokurso pri Esperanta turismo
- 111 Eksteraj rilatoj: La novembra kolokvo ĉe Unesco (E. Chicot)
- 112 Recenzoj
- 116 TEJO-paĝo: Ferioj en Insulo de Juneco; 39a IJK estos amasa!
- 117 Nekrologoj; Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 120 Oficiala informilo; Anoncetoj

La kovrilo

La urbestro de Vankuvero, s-ro Michael Harcourt (dekstre sur la kovrila foto), kaj la prezidanto de Loka Kongresa Komitato de la 69a Universala Kongreso de Esperanto, s-ro Wally du Temple, pozas kun la urbestra proklamo de la Semajno de Internacia Amikeco, kiun ankaŭ nia venontjara kongresurbo ĉi-foje prifestis. Ni devas konfesi, ke la kovrila foto atingis nin jam delonge. Tamen, kiel vi povus supozi, ni ne volis miksiĝi en viajn budapeŝtajn planojn per frua invito al Vankuvero. Ĉio ĉi montriĝis malprudenta politiko niaflanke, ĉar meze de junio la 68a UK en Budapeŝto jam havis ĉ. 4 700 aliĝintojn, tiel ke ĝi verŝajne montriĝos esti la plej amasa kongreso en la movada historio. Vankuvero venontjare ne havas grandajn ŝancojn venki Budapeŝton per la amaseco. Tamen, pro la unika beleco de la grandurbo ĉe la pacifika bordo de Kanado, pro la escepta komforto (ĉiuj kongresaj ejoj, inkluzive de la hotelĉambroj, troviĝas sur la sama universitata tereno), ĝi promesas esti unu el la plej agrablaj kongresoj lastatempe spertitaj. Cetere, la preparlaboroj por la 69a UK en Vankuvero disvolviĝas modele, pri kio vi legos detalojn en unu el niaj venontaj numeroj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 39; US \$ 18; GM 36; enoj 3150 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR-77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; ☎ (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; ☎ (03) 651 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; ☎ (215) 387 8288.

Por doni sencon al nia propra esperantisteco

Vi eble trovos, ke estas troigo doni unuarangan atenton en ĉi tiu revuo al la progresoj de Esperanto en Afriko dufoje ene de nur unu jaro. Ni faris tion en nia julia/aŭgusta numero pasintjare, kaj jen ni faras tion

denove. Ni do eventuale malsamopinias kun vi eĉ ĝis tiu grado, ke ni nun volas lanĉi konstantan rubrikon pri la Esperanto-movado en tiu kontinento. Vi tial povas atendi en ĉiu aŭ preskaŭ ĉiu revu-numero ĝis la fino de la jaro "afrikan" artikolon, kiu prezentos al la legantaro la movadajn progresojn en unuopaj landoj de Afriko.

Estas multaj kialoj por agi tiel. Ni provu listigi nur kelkajn el ili:

Tra la tuta ĝisnuna – kaj kiel vi sciis: preskaŭ centjara – historio de Esperanto, Afriko ĉiam estis la plej malforta ĉenero en la tutmondeco de la Internacia Lingvo. La kaŭzoj de tia stato estis unuavice historiaj kaj truditaj de ekstere. Intertempe Afriko preskaŭ komplete liberiĝis kaj fariĝis unu el la plej dinamisme evoluantaj mondpartoj. La afrikaj popoloj komencis reserĉi sian propran kulturan identecon kaj siajn proprajn lingvojn kaj interkomprenilojn. Tiu retro-

vo de la propra identeco kaj ĝia defendo fariĝis dum la lastaj jardekoj parto de la gvidsloganoj ankaŭ de la Esperanto-movado. Ne estas malfacile kredi, ke ni ĉi tiel modifis nian propran ideologian bazon kaj adoptis tiujn ideojn ĝuste pro la ĉeesto de nova Afriko sur la monda scenejo. Tamen, ni dum jardekoj faris nenion esencan por disvastigi la Internacian Lingvon en Afriko. Ni sidis kaj atendis, ke Afriko malkovru nin.

Pro la komplekseco de sia propra lingva situacio, Afriko devus kompreni niajn ideojn pri la neceso de komuna lingvo, pri lingva egalrajteco, pri lingva kaj kultura diskriminacio, multe pli bone ol tio okazas en la aliaj kontinentoj. Ankaŭ la relativa noveco de Esperanto ne devus esti ĝena por Afriko, ĉar la plimulto de ĝiaj lingvoj spertas renesancon kaj novecon de sia speco. Sed, malgraŭ tiu implicita kompreno kaj fekundeco de la grundo, ni faris malmulton antaŭe por utiligi ilin kaj por ĝermigi Movadon en Afriko.

Ni bezonis amason da jaroj por kompreni, ke ni ekiros de nulo en Afriko nur kiam ni havos afrikanojn mem, kiuj fariĝos la portantoj de la internacilingva movado en la kontinento. Ĝuste tiaspeca evoluo okazas dum la lastaj kelkaj jaroj. Afrikaj esperantistoj jam ekzistas. Plej ofte ankoraŭ temas pri izolitaj lernantoj, precipe en nordaj kaj saharaj landoj de la kontinento. Grupiĝo kaj organiziĝo de la lokaj esperantistoj okazas en Zairio, Eburia Bordo kaj – jam de pli frue – en Madagaskaro. Sur la sojlo de landa organiziĝo troviĝas ankaŭ grupoj en Senegalio, Benino, Gano, Nigerio, Kamerunio, Zambio, Kenjo kaj Ruando. Dum la lastaj du monatoj venis centoj da informpetoj el Tanzanio, kaj ĝi verŝajne nun estas tiu afrika lando en kiu plej multe da komencantoj klopodas akiri la bazan scion de Esperanto.

Vi povas kompreni, ke estas necesa grandega forstostreĉo, homa kaj financa, por teni kaj evoluigi la nunan intereson pri Esperanto en Afriko. Ankaŭ UEA estas nur parte preparita por tia grandega tasko. Tio aparte koncernas la malnovan Fondaĵon Azio-Afriko, kiu iam malsukcesis taŭge elspezi eĉ kelkajn centojn da guldenoj jare, kaj al kiu nun ne sufiĉas pluraj dekmiloj da guldenoj de januaro ĝis decembro. Ne vere temas pri inflacio, sed pri vera inundo de informpetoj kaj korespondaj lernantoj en tuta aro da afrikaj landoj. Ni ne petos ĉi tie pri monkontribuoj, des pli ke tion faras aparta teksto en ĉi tiu revunumero. Ni volas tiri vian atenton al alia aspekto de la klopodoj disvastigi Esperanton en Afriko.

Oni ja ĝenerale estas esperantisto pro tio, ke oni havas almenaŭ iom da internaciisma edukado, ke oni estas disĉiplo de internacia kunlaboro, ke oni emas rigardi la mondon kaj la homaron kiel unu tuton, kaj ne kiel aron da izolitaj, memsufiĉaj popoloj kaj ŝtatoj. Se estas tiel, tiam oni nek povas nek rajtas sidi en sia loka Esperanto-klubo, kunveni unufoje semajne



**Eburborda
folklora statueto**

aŭ monate, kaj montri nenian intereson pri la evoluo kaj problemoj de la tutmonda Esperanto-movado. La Internacia Lingvo akiras sian sencon nur se ni agas por ĝi internacie, se ni praktikas ĝin internaciskale. La lumbildojn pri la feriaj vojaĝoj oni ja povas rigardi ankaŭ en alia loka klubo (naturamika, ekzemple), sed ili ne rajtas fariĝi la tuta senco de nia esperantisteco.

Ne ĉiu povas agi internacie, vi dirus. Necesas ankaŭ ia loka laboro. Jes, estas tiel, sed ankaŭ tiu loka agado por Esperanto akiras sian sencon, nur se ĝi estas parto de internacia, tutmonda klopodo solvi la problemon de la monda komunikado pere de la Internacia Lingvo. Eĉ se ni plene esperantigas la lernejon, fabrikon, urbon aŭ landon, kie ni studas, laboras aŭ vivas, tio ne havas multan sencon, se io simila ne okazas ankaŭ en Afriko kaj aliaj kontinentoj. Estas granda iluzio kredi, ke Esperanto povos atingi sian finan celon – la ĝeneralan akceptiĝon kiel internacia komunikilo – sen ke ni ankaŭ en Afriko atingu minimume tian disvastiĝon de la lingvo, kian ĝi spertas en la aliaj partoj de la mondo. Oni ne plu povas –feliĉe!– trudi al Afriko decidojn de ekstere. Afriko nun mem pensas kaj decidas, ĝi do devas agi laŭ siaj propraj sperto kaj konvinko. Ni tial ŝuldas ankoraŭ Esperanton al Afriko kaj ni devas doni prioritatan atenton al la disvolviĝo de la Esperanto-movado tie.

Hans Bakker kaj Renato Corsetti, du funkciuloj de UEA ŝarĝitaj pri la agado en Afriko, jam de kelkaj jaroj proponas ĝemeliĝon de Esperanto-klubo kaj asocioj el la aliaj kontinentoj kun la novaj grupoj en Afriko. Tion jam faris kelkaj kluboj en Francio kaj Svedio. En la 67a UK en Antverpeno Bakker funkciigis apartan poŝtkartan servon por kuraĝigi la afrikajn novulojn kaj ekkorespondi kun ili. Nun dekoj da esperantistoj tra la mondo regule kontaktas afrikajn lernantojn de Esperanto. Tiel ankaŭ tiuj dekoj da neaktivaj sciantoj de la lingvo fariĝis aktiva parto de la klopodo progresigi la Internacian Lingvon en Afriko. Tiel ili donis sencon al sia propra esperantisteco.

Ekzistas bezono por pliaj ĝemeliĝoj kaj korespondaj kontaktoj de tia speco. Se ankaŭ vi mem aŭ via loka Esperanto-klubo volas doni sencon al via esperantisteco, se vi pretas transformiĝi de pasiva konsumanto de Esperanto al aktiva batalanto por ĝia disvastigo en Afriko, ne hezitu komuniki tion al: Hans Bakker, Kastelenstraat 231/II, 1082 EG Amsterdam, Nederlando. Se vi faros tion, vi aŭ via Esperanto-klubo ne nur grave helpas la tutmondigon de la Movado, sed vi donos tute novan dimension al via loka grupo, kiu ĉesos vegeti kaj komencos vivi kaj fariĝi integra, aktiva parto de la internacia Esperantomovado.

sm

Prof. Knappert donacas svahilan vortaron

Ĉi-jare aperos *Vortaro de Esperanto kaj svahila* de Jan Knappert. Kiel la unua Esperanta vortaro por pure afrika lingvo, ĝi estos mejloŝtono por la Esperantomovado sur tiu kontinento.

La svahila lingvo estas oficiala en Tanzanio kaj Kenjo, sed ĝi estas uzata kaj de denaskaj parolantoj kaj kiel interlingvo ankaŭ en pluraj aliaj landoj de orienta Afriko.

La vortaro, kiu havas amplekson de 130 paĝoj, helpas doni firman fundamenton al la laboroj krei la komencon de Esperantomovado en svahilingvaj regionoj, kiel ankaŭ plusproni klopodojn fari Esperanton senpere alirebla por ankoraŭ pli da afrikanoj. La eldonon prizorgis la Komisiono por Regiona Agado kaj publikigos UEA.

La kompilinto, profesoro Jan Knappert, estas nederlandano kaj internacie konata, pinta specialisto pri afrikaj lingvoj kaj kulturoj. Li studis en la Lejdena Universitato pri Orientaj Lingvoj kaj Kulturoj precipe lingvistikon kaj historion pri la religioj. En 1958 li doktoriĝis pri svahila literaturo. Li multe vojaĝis tra Afriko kaj Azio. "La vojaĝado," li diras, "estas Eldorado por tiu, kiu pristudas la homon mem." Dum unu jaro li servis kiel asistanto pri afrikaj lingvoj ĉe la

Ŝtata Universitato de Orienta Afriko en Kampalo, Mombaso kaj Dar-es-Salamo. Li de post 1964 lekcias ĉe la Departemento pri Afrikaj Lingvoj ĉe la Lernejo por Orientaj kaj Afrikaj Studoj de la Londona Universitato, sed de 1970 ĝis 1976 li vojaĝadis por povi instrui ankaŭ en Lovenio, Belgio. Li jam verkis ĉirkaŭ 20 librojn kaj centon da artikoloj pri sciencaj temoj.

Estante ankoraŭ infano, Jan Knappert lernis Esperanton kiel sian unuan fremdan lingvon en 1937. Li mem diras, ke liaj fruaj konoj kaj informiteco protektis lin "poste de alpreno de opinio kontraŭ Esperanto, male de multaj aliaj homoj, kiuj havas tiun sintenon pro nescio".

Prof. Knappert havas sentemon kaj amon por literaturo kaj arto: poezio, deklamarto, pentroarto, arkitekturo kaj muziko. Li mem verkas poemojn, precipe naturlirikajn, ĉar nenion li preferas super la vagado en arbaroj kaj dunoj kun malnova amiko-biologo, skolante strigojn, vulpojn kaj aliajn bestojn, kiuj ankoraŭ estas observeblaj en sia natura konduto.

Estis supozeble denove Hans Bakker, kiu "malkovris" por la Movado profesoron Knappert antaŭ deko da jaroj kaj gajnis lian kunlaboron en la tiutempaj seminarioj de TEJO. Ni povas konsideri aparta feliĉo, ke la multflanke okupita prof. Knappert trovis tempon por tia valorega pionira kontribuo al la disvolviĝo de la Esperantomovado en Afriko, kia sendube montriĝos esti lia Esperanta-svahila vortaro.



Kio okazas en Ebura bordo?

Kio estas la plej grava kriterio por juĝi la internaciecon de lingvo? Ĉu la nombro aŭ la geografia disvasteco de la parolantoj? Komparu la anglan kun la ĉina. Laŭ mi, pligravas la disvasteco. Tio devas esti nia unua celo, pli baldaŭ atingebla, ol ni povas grandkvante altigi la nombron de la parolantoj de Esperanto.

Sed kiajn avantaĝojn ricevos afrikanoj mem el la lernado de Esperanto? Ili estos multaj, sed ĉefe oni povas citi uzadon de lingvo vere internacia por internaciaj rilatoj, kaj ne de lingvo, kiu devige rekondukas Afrikon al ĝiaj ekskoloniantoj. Krome, Esperanto ŝirmas la kulturan identecon dank' al sia neŭtraleco, aldone al tio, ke ĝi estas pli facile lernebla kaj malpli koste instruebla, ol aliaj lingvoj.

Sed, ĉu Afriko estas sufiĉe disvolviĝinta por enkonduki Esperanton? Jes, ĉar en Afriko ne ekzistas nur malsatego kaj analfabeteco. Estas tie jam disvolviĝintaj lokoj kaj ankaŭ altnivelaj studentoj.

Mi skizu la ĵusan kaj nunan agadon en Ebura Bordo, okcidenta Afriko. Dum sia altlerneja studado en Eŭropo ebur-bordano eksciis pri la Esperantomovado. Sed tio tamen okazis tuj antaŭ lia reveno al sia hejmlando. Tial li komencis lerni Esperanton per korespondado kaj cetere vekis intereson ĉe konatoj ĉirkaŭ si. Tiutempe alilanda esperantisto, kiu laboris en Ebura Bordo, kontaktis la grupon por kune agadi. Oni komencis kursojn, unue ĉe privata lernejo, sed ekde februaro 1983 ĉe universitato. Nun funkcias du apartaj elementaj kursoj du horojn semajne kun ĉirkaŭ dudeko da lernantoj.

Kiajn instruojn oni povas tiri el tiu rakonto? Unue, estas grave kontakti afrikanojn, kiuj restadas alilande. Due, oni ja povas eklernigi Esperanton per korespondado. La Movado devus evoluigi pli ampleksan servon en la formo de korespondaj kursoj. Trie, oni starigu kursojn surloke. Ĉiuokaze, esperantistoj nepre informu la Komisionon pri Regiona

Agado de UEA pri siaj vizitoj kaj restadoj en Afriko por interrilatigi. Kuniĝo faras forton.

Koncerne mian kurson mem, mi elektis kiel instrumaterialon moveblajn, kolorajn afiŝojn. En Afriko oni bezonas de la komenco kursojn, kiuj estas facilaj ankaŭ por la kursgvidanto, se oni deziras rapide multigi la nombron de elementaj kursoj. Por mezgradaj kaj superaj kursoj taŭgas studado per korespondado.

Afriko ankoraŭ bezonas la helpon de vi, la tutmonda esperantistaro!

Gilles Wallez,
Ebura Bordo

Dek parolantoj kontraŭ unu ministra deklaro

Dum ĉiuj sin demandas, ĉu naskiĝis unue ovo aŭ kokino, esperantistoj same senresponde frontas la demandon, ĉu pli valoras dek esperantistoj, ol unu solena deklaro de ministro pri la beleco de la esperantista idealo.

Ni ne volas solvi la problemon ĉi tie, kaj ni eĉ suspektas, ke ambaŭ same valoras. Ju pli da ministraj kaj ambasadoraj deklaroj, des pli da esperantistoj allogoblaj, kaj ju pli da esperantistoj, des pli da ambasadoroj pretaj al solenaj deklaroj.

Ĉiukaze, ni, t.e. la homoj, kiuj okupiĝas pri kontaktoj kun esperantistoj en Azio, Afriko kaj Sud-Ameriko en la kadro de la Komisiono pri Regiona Agado de UEA, laboras, por ke estu almenaŭ dek parolantoj en kiel eble plej multe da landoj en tiuj kontinentoj.

Kompreneble, la legantoj de ĉi tiu revuo ja scias, ke en pluraj landoj de Azio kaj de Sud-Ameriko la Esperanto-movado estas nun travivanta sian "printempon". Ĉinio, Irano, Brazilo aŭ Venezuelo estas nur kelkaj el la nomoj, kiuj ofte revenas al la paĝoj de la movadaj revuoj.

Tamen, en la plejmulto de tiuj landoj Esperanto estas ankoraŭ luktanta por akiri realan bazon. UEA staras malantaŭ ĉiuj tiuj klopodoj de izolitaj esperantistoj en Angolo, Tajlando, Senegalio aŭ Nikaragvo. Temas pri silenta, "postkulisa" agado, kies fruktoj malrapide maturiĝas. Vi eble legis, ke en Hinda Unio finfine aperis "*Vortlibro*" en la bengala kaj Esperanto, kaj ke fondiĝis tuthinda Esperanto-organizaĵo. La laboro por tio komenciĝis antaŭ jardekoj, kaj ĝi konsumis la energion de kelkaj inter la plej bonaj esperantistoj. Ĝi ankaŭ forkonsumis multan monon, kiun UEA tra la jaroj sukcesis ŝpari kaj malavare donaci. Vi eble legis, ke oni en Kenjo studas Esperanton. UEA pagis la ĵurnalajn varbanoncojn kaj la lernomaterialon.

Nu, en la nuna momento la plimultiĝo de niaj agadoj en pluraj afrikaj kaj aziaj landoj sen organizita Movado kondukis al momenta malpleniĝo de la kaso, t.e. la Fondaĵo Azio-Afriko ĉe UEA. Kvankam bedaŭrante, ni estos devigataj post kelka tempo komenci rifuzi petojn pri lernolibroj kaj informiloj, se la Fondaĵo ne repleniĝos. Ni ne volas fari tion, kaj mi opinias, ke ankaŭ vi ne volas, ke ni faru tion.

Sendu viajn donacojn al UEA, kun la indiko "Azio-Afriko". Ni aparte ŝatas malgrandajn donacojn, ĉar malantaŭ ili oni sentas pli facile la homan solidarecon de la donacintoj, kiuj malgraŭ propraj malfacilaĵoj tamen donacis ion. Kompreneble, ni akceptas ankaŭ grandajn donacojn.

Ĉe multaj el vi en la industriaj landoj, sieĝas vin diversaj bonintencaj kaj aliaj fondaĵoj kaj institucioj, kiuj kolektas monon por helpi la evolulandojn. Estas utile, ke esperantistoj memoru, ke ili jen havas sian propran evoluprogramon en la formo de la Fondaĵo Azio-Afriko. Se vi helpas al tiu fondaĵo, vi ja ankaŭ partoprenas la ĝeneralan klopodon subteni la evolulandojn, sed en ĉi tiu kazo vi destinas vian helpon al io, pri kio ankaŭ vi persone estas aparte interesita. Helpi la Fondaĵon Azio-Afriko, tio estas la specifa esperantista maniero de helpo al la evolulandoj.

Renato Corsetti

estrarano pri Landa kaj regiona Agado

LANDA AGADO

Bonaj perspektivoj de la korea movado

Ne multe sciante pri malgranda lando, oni ofte emas supozi, ke ties kulturo verŝajne similas al tiu de ĝiaj najbaroj. Tial surprizis min ne trovi en Koreio nigran teon, nek verdan, sed hordean. La manĝaĵoj ofte estas akraj, kaj la rizon oni plej ofte manĝas ne per la metalaj manĝbastonetoj, sed per plata kulero.

Simile, la sudkorea Esperanto-movado posedas plurajn atentindajn karakterizaĵojn. Ĝi ne estas granda, sed ĝi konsistas el mirinde multaj junaj homoj, dum inter la malpli ol 400 membroj de la landa asocio troviĝas multe pli da elstare kapablaj homoj, ol oni atendus.

De post la apero de Esperanto en Koreio en la dudekaj jaroj, la tiea movado trairis multajn diversajn malfacilojn, simile kiel la nacio mem. Tamen, nun ŝajnas al mi, ke la Esperanto-movado en Koreio estas en pli promesa situacio, ol iam antaŭe.

Lastatempe grandan puŝon al la prestiĝo de Korea Esperanto-Asocio donis ĝia nova prezidanto kaj mecenato, d-ro Ĵian Ĉun-sik, la rektoro de la Universitato Dankuk en Seŭlo. La landa asocio mem havas

tian duĉambran sidejon, pri kiu pluraj eŭropaj landaj asocioj ankoraŭ nur revas. Ĝia nova – juna, plentempe dungita – sekretario en aprilo vizitis plurajn lokajn grupojn por interkonsiliĝo. En la oficejo aldone laboras du pliaj junaj dungitinoj.

La situacio de la revuo *La espero el Koreujo*, subvenciata de la Ministerio pri Edukado – tamen redakte sendependa – kaŭzis kelkajn neoportunaĵojn por la loka movado. Tamen, nun ŝajnas, ke ĉio ĉi baldaŭ solviĝos, eble tiel ke la revuo estos aliformita al vera organo de KEA.

En kunloĝado ekster Seŭlo mi renkontis plurajn gejunulojn, kiuj flue kaj lerte uzas la lingvon. Krom pezaj studtaskoj kaj militservo, ili trovis kaj tempon kaj emon aktivi, ofte kiel gvidantoj de loka junulara aŭ universitata grupo. Oni jam de pluraj jaroj konscie edukas ĉi tiajn gvidantojn. Ankaŭ cele al konscia disvastigo, oni aranĝas kunvenojn en urboj, kie ankoraŭ ne troviĝas esperantistoj, por stimuli aperon de grupeto tie.

Oni kompreneble tre interesiĝis pri miaj spertoj en Ĉinio. Trifoje oni aranĝis por mi publikan prelegon (du en universitatoj) pri Ĉinio kaj ties Esperantomovado. Tiaj publikaj prelegoj ne estis imageblaj en Korea Respubliko antaŭ nur kelkaj jaroj.

Mi estis afable kaj gastame prizorgata dum mia tuta restado en Seŭlo, Gŭanĝu kaj Daegu, sed tute



aparte tuŝis mian koron la juna esperantista grupo en Busan. Ili ne nur atente flegis min dum kelktaga subita malsaniĝo, sed tio, ke ili ĉiam inter si parolas Esperanton, tre pozitive impresis min. Tio kompreneble multe influis la altigon de ilia lingvonivelo.

Estas ege malfacile por koreoj vojaĝi eksterlanden, des pli por gejunuloj, kaj vizitoj de eksterlandaj esperantistoj okazas ne ofte. La sola alia, praktike alirebla Esperanta parolado estas tiu de Radio Pekino.

Unuarenkonte kurioza, sed ĉarma propraĵo de la korea movado estas la multa uzado de Esperantaj kromnomoj. Veras, ke estas pli facile por eksterlandano orientiĝi kun nomoj kiel Hela, Malprofesoro

kaj Piramido, kvankam li aŭ ŝi aliflanke devas provi lerni du nomojn por ĉiu.

La korea esperantistaro nun sendube troviĝas en avantaĝa situacio. Eble plej grave estas, ke temas pri unueca landa movado. Krome, ĝi estas juneca, vigla, ne malbone organizita kaj havas certagradan apogon de kulture gravaj personecoj kaj instancoj. Per saĝa laboro la perspektivo estas forta kresko tra la venontaj jaroj. Mi esperas, ke alilandaj esperantistoj intertempe starigos pli da kontaktoj kun Koreio, por rompi ĉiun reston de la izoleco, kiu ankoraŭ neeviteble sentiĝas ĉe la tiea esperantistaro.

Geoffrey Sutton

Nova generacio ĉefrolas en Germana E-Asocio

Dum la 61a Germana Esperanto-Kongreso, meze de majo en Bad Säckingen (FR Germanio), la jarkunveno de Germana Esperanto-Asocio elektis konsiderinde pli junan estraron. La nova estraro nun havas mezan aĝon de malpli ol 40 jaroj, tiel ke oni vere povas paroli pri generacia ŝanĝo en la gvidorgano de GEA. Kio estas aparte substrekinda estas la fakto, ke tia radikala ŝanĝo okazis tre trankvile kaj senskue, tiel ke la normala vivo de ĉi tiu landa organizaĵo plu-evoluas. Aliflanke, estas ja tre verŝajne, ke la nova estraro baldaŭ montros iniciatojn sur novaj laborkampoj. Fakte, io tia jam okazis, ĉar iaspeca agadprogramo de la novaj gvidantoj jam aperis, antaŭ la Kongreso, en la asocia periodaĵo *Esperanto Aktuell*.

La nova prezidanto de GEA estas Helmut Klünder (1948), iama prezidanto de Germana Esperanto-Junularo. Ankaŭ la nova kasisto, Friedrich Hilpert, apartenas al la junularaj rondoj, simile kiel Ursula Felhölter (ŝi estas la nuna prezidanto de Germana Esperanto-Junularo) kaj Franz Kruse (ankaŭ iama prezidanto de GEJ), kiu en la nova estraro aparte prizorgos la gravan laborkampon de progresigo de kontaktoj kun sciencaj rondoj. D-ro Rudolf Fischer reelektiĝis kiel vicprezidanto de GEA, kun la speciala tasko reorganizi la membroadministradon (kun transiro al aŭtomatigo). Reeleektiĝis ankaŭ Richard Hirsch kiel ĝenerala sekretario.

La ĝisnuna prezidanto de GEA, s-ino Elsbeth Bormann, estis elektita kiel honora prezidanto de GEA, kun la speciala tasko reprezenti la Asocion dum la baldaŭa 70a Universala Kongreso en Augsburg (en 1985). Ŝi plue respondecos en GEA ankaŭ pri la agado ĉe la eŭropaj instancoj, tasko, kiun ŝi jam de pluraj jaroj sukcese plenumis.

Unu el la plej interesaj agadkampoj de GEA en la pasinta jardeko estis la servo "Letero de leganto", kiu

dum la naŭ jaroj de sia ekzisto aperigis centojn da leteroj pri Esperanto en preskaŭ ĉiuj germanaj gazetoj. Ankaŭ tiu servo nun havas novan prizorganton, Karlheinz Schlottbom.

Komence de ĉi tiu jaro GEA havis 844 individuajn membrojn, aldone al 239 gejunuloj de GEJ. Krome, ekzistas, laŭ informoj pri kiuj disponas GEA, 1 466 aliaj germanaj esperantistoj, kiuj ofte membras en UEA, lokaj grupoj kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj, sed kiuj ĝis nun ne estis rekte ligitaj al GEA. Sekve de tio ili ne ricevas regulajn informojn pri la agado de la asocio, ili ne partoprenas aŭ subtenas ĝiajn entreprenojn. Tion la nova estraro taksas nepre ŝanĝenda. Ĝi tial planas eĉ ellaboron de statutŝanĝoj, tiel ke tiu nova statuto pli firme ligu ĉiujn esperantistojn en FR Germanio.

Krom tiu akcento je kunlaboro, alia ĉefcelo de la nova gvidantaro de GEA estas ŝargi de pliaj komisiitoj pri apartaj laborkampoj, kiel: kultura, turisma, familia, parlamenta kaj instruista agadoj.

KORESPONDA UNIVERSITATO

Mankas konvinkaj argumentoj

Pluraj Esperantaj gazetoj traktis la eblecojn starigi korespondan universitaton, kiu uzus la Internacian Lingvon. Nia revuo laste skribis pri tio antaŭ unu jaro. Ĉar la temo restas aktuala kaj oni diskutas ĝin ankaŭ koresponde ni petis la konsenton de prof. Sherwood, ke unu el liaj tiurilataj leteroj aperu ĉi-sekve, kun minimumaj adaptoj niaflanke.

Plejparte oni argumentas por "tele-universitato", tiel ke studento povu diplomigi ie ajn en la mondo sen la neceso loĝi ĉe la universitato. Spite al moderna nomo, temas simple pri perpoŝta instruado: tre malnova sistemo adekvata por foja kurso, sed ne adekvata por diplomigo. Ĉiam ekzistis kaj plu ekzistos perpoŝtaj kursoj de Esperanto, kaj ni scias, kiaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj estas en tiaj kursoj. La baza ekzistokialo de korespondaj kursoj estas la bedaŭrinda fakto, ke oni tre malofte instruas Esperanton oficiale. Simile, kiam mi estis studento mi volis lerni la italan, kiun oni ne instruis ĉe mia plejparte inĝeniera universitato (Purdue), do mi sekvis dusemestran korespondan kurson el alia universitato, kun suplementaj konversacioj kun loka parolanto.

Tia duonsolvo neniel povas konkurenci kun oficiala normala kurso. Do ni ofertas nenion, se ni provizas ekzemple elementan kurson de kemio koresponde. Tion oni instruas ĉie (ĉu bone, ĉu malbone, sed preskaŭ ĉiam la loka nebona kurso estas pli avantaĝa, ol la fora poŝta kurso). Oni notu ankaŭ, ke

scienco estas treege malfacila studobjekto eĉ en la denaska lingvo. La celo do devus esti instruado en la denaska lingvo, ne en Esperanto, almenaŭ ĝis la nivelo de post-diplomaj kursoj aŭ esploroj. Provi lerni kaj poŝte kaj Esperante signifas duoble perdi.

Iom same mi ankoraŭ ne bone komprenas, kio estas la grava utilo de traduko Esperanten de bazaj universitataj lernolibroj. Ekzemple, en Irano certe ekzistas multoble pli da sciencistoj, ol en Esperantujo. Multe pli helpus al iranaj studentoj havi perslingvajn lernolibrojn, ol Esperantajn, kaj ekzistas pli da laborfortoj por tia traduklaboro. Se Irano ne sukcesis traduki sufiĉe persan, kiel povas sukcesi tiurilate la esperantistaj sciencistoj? Mi emfazu, ke Unesko kaj aliaj organizaĵoj jam ofte emfazis la gravon de instruado per la denaska lingvo, ĝis certa aĝo. Kaj mi konstatas el propra sperto, kiel malfacile estas por miaj usonaj studentoj plene kompreni sciencajn tekstojn, eĉ en la angla, kiu estas ilia gepatra lingvo.

Mirinde ampleksan laboron faras Antono Alonso Núñez en Compostela, Hispanio, celante kursojn kun internacia etoso kaj kun unusemajna gastprelegado de serio de eksterlandaj esperantistoj, kiuj kunlabore diskutas pedagogion de elementa universitata scienco. Li jam preparis abundan materialon, kaj plej grave, li havas sufiĉe fortan subtenon de la Universitato. Mi kredas, ke la kunigado de spertuloj riĉigus la pedagogian sciencon, sed mi ne vidas klare, kian avantaĝon havus la lokaj studentoj, nek kial studento volus iri al Compostela por baza kurso de scienco, prezentita en nendenaska lingvo. La proponata kurso almenaŭ havas la avantaĝon, ke ĝi ne estas perpoŝta.

Inter la diskutoj pri internacia universitato estas mirinde, ke oni preskaŭ tute ignoras SUK. Jen longdaŭra, stabila aranĝo, kie internacinivelaj spertuloj prezentas altkvalitajn kursojn en Esperanto. Laŭ la nombro de studantoj SUK ne estas tiel sukcesa, kiel oni volus. Kial? Mankas ĝusta situacio; mankas "sojla maso"; kaj ĉiu ordinara studento en Eŭropo havas aliron al similaj kursoj pere de sia denaska lingvo. La ekzisto de SUK estas tre bona, kaj la movado devus pli subteni ĝin, ol ni faras. Sed la spertoj de SUK klare montras, kiaj estas la realaj limoj, inter kiuj ni povas fari ion utilan. Mi havas la impreson, ke oni parolante pri internacia universitato ne parolas pri SUK pro tio, ke tiu ekzemplo subfosas multajn belajn revojn. Eĉ la eldonataj kursolibroj de SUK verŝajne ne furore vendiĝas – kial do estontaj sciencaj libroj estos treege valoraj kaj sopirataj de ĉiuj?

Mi bedaŭras mian negativan sintenon pri la diversaj proponoj, sed mi ĝis nun ne vidis konvinkajn argumentojn. Sole la tre sperta Ottó Haszpra publike donis por mi kontentigan analizon, en sia bona artikolo, kiu aperis en revuo *Esperanto* (julio 1982). Notu, ke li estas preskaŭ same negativa kiel mi rilate la plejparton de la iniciatoj kaj ideoj. Lia ideo pri

Björn Collinder

1894-1983

Björn Collinder, membro de Honora Patrona Komitato de UEA, estis unu el la plej elstaraj specialistoj pri la finn-ugraj lingvoj kaj eble la plej elstara kaj kompleta sveda lingvisto dum pluraj lastaj jardekoj. Kvankam lia speciala studkampo estis la malgranda urala lingvofamilio, li unue studis la hindeŭro-



pan komparan lingvistikon. Lia scio pri la literaturoj kaj lingvoj de ĉiuj ĉi multaj popoloj estis tiel profunda, ke li tradukis al sia gepatra mondliteraturajn verkojn kiel "Iliado", "Eddo", "Kalevala" kaj multe pli. Kvankam Collinder neniam multe aktivis en la Esperanto-movado, li regis la lingvon kaj ĉiam pretis defendi ĝin. Dum la 65a Universala Kongreso en Stokholmo li akceptis la rolon de la rektoro de Internacia Kongresa Universitato. La forpaso de Collinder estas granda perdo por la esperantistaro, ĉar lia prestiĝo sur la kampoj kultura kaj lingva estis nedisputebla.

Profesoro Björn Collinder mortis la 20an de majo en la aĝo de 88 jaroj, en Uppsala, Svedio. Post doktoreca disertacio pri "La finn-lapona konsonant-gradiĝo", li en la jaro 1933 estis nomita profesoro pri finn-ugraj lingvoj ĉe la Universitato en Uppsala. Per nekalkulebla nombro de lingvosciencaj verkoj, lernolibroj kaj vortaroj, Collinder akiris tutmondan fakan reputacion kiel eminenta kaj ideoriĉa filologo kaj lingvisto. Temoj kiel praĝermanaj pruntvortoj en la finna lingvo, parencaj rilatoj inter siberiaj lingvoj, akcentproblemoj en la turka lingvo kaj la kulturo de la svedaj laponoj estas nur kelkaj ekzemploj de lia multampleksa laborkampo. Post sia emeritiĝo en 1961, Collinder agis kiel gastprofesoro en Aŭstralio, Aŭstrio kaj Usono, kaj kiel prelegisto pri ĝenerala lingvoscienco ĉe universitatoj en pluraj mondpartoj. Krome, Collinder lerte tradukis i.a. la finnlingvan nacian epopeon *Kalevala*, la islandan poezian sagaon *Eddo*, la antikvan anglan heroan poemon *Beowulf* kaj multajn verkojn de Ŝekspiro kaj de klasikaj grekaj aŭtoroj, ĉiam en la originala versmezuro. Memkompreneble, li ricevis multajn honorajn doktorecojn kaj aliajn distingajojn de sciencaj akademioj kaj societoj.

Jam en sia junaĝo Collinder aliĝis al la Esperantomovado. Lia patro estis gimnazia instruisto kaj unu el la fruaj svedaj esperantistoj ĉ. 1890 kaj kuraĝe atakis la problemon pri la lingva konfuzo. En 1933 Collinder forte kaj kompetente pledis por Esperanto en multhora lingva diskuto en la sveda radio. Dum la jaroj 1935 kaj 1936 li prizorgis radian prelegserion pri "La problemo de lingvo internacia" (publikigitan en la Esperanta librokolekto de Muusses), kaj plurfoje li prelegis en movadaj kongresoj kaj aliaj kunvenoj.

En siaj grandaj svedlingvaj verkoj, *La lingvo* kaj *Enkonduko en la lingvosciencan*, li entuziasme argumentis por la sola praktike uzebla internacia lingvo, nome Esperanto. Sveda Esperanto-Federacio nomis Björn Collinder honora prezidanto, kaj UEA elektis lin ano de sia Honora Patrona Komitato.

Persone Björn Collinder estis tre humila kaj kompleza homo, ĉiam fidela al siaj idealoj kaj vere sincera al siaj multaj amikoj.

Karl Söderberg

post-diploma instituto povas en la realo esti simple kunordiga organizaĵo por kontaktigi profesorojn kaj studantojn. Ja li klare emfazas, ke plejparte temos ne pri koresponda studado, sed ke la studanto iru al la universitato de la profesoro. La rolo de Esperanto tiel estas tiu de kontaktilo, kiu donos al junulo la eblecon labori Esperantlingve kun konata profesoro. Mi kredas, ke ankaŭ Helmar Frank havas interesan pers-

pektivon pri eblaj post-diplomaj kursoj, kaj eble lia starpunkto iom similas tiun de Haszpra.

Fine mi notas, ke diversaj eksterusonaj petantoj demandas pri la kalifornia "Universitato Komenio", pri kiu *Monato* informis. Ĉar la fondinto de tiu verŝajne nur surpapera organizaĵo ne respondas al leteroj, ni eble rajtas supozi, ke la organizaĵo ne ekzistas.

Bruce Arne Sherwood

Buĝetpropono

de Universala Esperanto-Asocio

por 1984

(ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj)

KOSTOJ

Salajroj, malnete	327 000
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	73 000
Salajroj, nete	400 000
Afranko kaj telefono, nete	27 100
Presaĵoj	11 000
Materialoj	9 000
Riparo kaj prizorgo de maŝinoj	9 000
Trinkaĵoj	1 500
Revizoro	1 400
Helpo de GCA al CO k.a.	11 000
Centra Oficejo, nete	70 000
Fotokopiado, nete	3 000
Gasoj, elektro, akvo	12 100
Riparo de la domo, purigiloj k.s.	3 100
Impostoj je la domo, asekuro	4 400
Minus lupagoj pro ĉambroj	- 2 600
Oficeja domo, nete	17 000
Preskostoj de <i>Esperanto</i> (10 n-roj)	37 000
Sendokostoj	40 000
Kovertoj	3 000
Grafiko ktp.	32 000
Ekspedlaboro ĉe GCA	17 000
Minus anoncoj	- 18 000
Esperanto, nete	111 000
Preskostoj de la Jarlibro	22 000
Sendokostoj	13 000
Kovertoj	1 300
Grafiko	10 000
Ekspedhelpo	700
Minus anoncoj	- 12 000
Jarlibro, nete	35 000
Preskostoj de <i>Kontakto</i>	9 000
Sendokostoj	7 000
Ekspedlaboro, kovertoj	3 400
Grafiko	8 200
Redakto, teknika redakto	5 900
Minus anoncoj	-500
Kontakto, nete	33 000
Veturkostoj oficejaj	5 800
Vojaĝkostoj kongresaj	14 500
Vojaĝkostoj Estraro de UEA	15 000
Vojaĝkostoj Estraro de TEJO	2 200
Komisionoj kaj komisiitoj	500
Reprezentaj kostoj	2 000
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	40 000
Volontula Servo	5 000
Korespondo estrara kaj komisiona	12 000
Bankkostoj	3 200

Donacoj kaj premioj	7 400
Diversaj kostoj	400
Ĝeneralaj kostoj, entute	11 000
Deprezo de la domo, ĉ. 1%	2 000
Deprezo de la inventaro, 10%	3 000
Deprezo de la komputilo, 12,5%	10 000
Deprezo de programoj k.a., 20%	30 000
Deprezoj, entute	45 000
Sumo de la kostoj	782 000

RIMEDOJ

Kotizoj MJ (Membro kun Jarlibro)	22 400
Kotizoj MA (Membro-Abonanto)	230 700
Kotizoj MJ-K (kun <i>Kontakto</i>)	3 900
Kotizoj MA-K (kun <i>Kontakto</i>)	11 300
Aligitaj membroj de UEA	22 100
Aligitaj membroj de TEJO	6 900
Simplaj abonoj de <i>Esperanto</i>	10 300
Kolektivaj abonoj de <i>Esperanto</i>	7 300
Abonoj kaj vendoj de <i>Kontakto</i>	12 000
Kolektivaj abonoj de <i>Kontakto</i>	4 500
Societo Zamenhof	30 000
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	2 600
Kotizoj entute	364 000
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	10 000
Vendoj de Libroservo	257 000
Minus kostoj de la varoj	- 148 000
Minus tantiemoj	- 6 000
Minus katalogaj kostoj	- 13 000
Libroservo, nete	90 000
Abonservo, nete	7 000
Grafikaj laboroj, Roterdamo, nete	1 000
Antverpena Oficejo, nete	100 000
20% de kotizoj de la 69a UK	46 000
50% de licencpago IJK	4 000
Kongresoj, entute	50 000
Turismaj aranĝoj	30 000
Rento, nete	37 000
Vendo de uzitaj poŝtmarkoj	2 500
Diversaj rimedoj	500
Ĝeneralaj rimedoj, entute	3 000
De inventaro pro programado	25 000
De kapitalo dumvivaj membroj	24 000
De TEJO/KER pro volontuloj	11 000
De kapitalo pro domrenovigo	25 000
Kompensoj, entute	85 000
Subvencio (flugkredito)	5 000
Sumo de la rimedoj	782 000

RIMARKO: La Estraro frontis ĉi-foje apartajn problemojn por ekvilibrigi la spezojn en la buĝeto por la jaro 1984. Kvankam la propono antaŭvidas altigon de la kotizoj por la venonta jaro, tio neniel sufiĉis, kaj necesis fari kuraĝajn prognozojn pri grandaj enspezoj el aliaj fontoj (librovendoj, turismaj aranĝoj, grafikaj laboroj ktp).

Utile en Strasburgo, sukcese en Bruselo


Du kunvenoj dediĉitaj al la parlamenta agado okazis lastatempe: la 30an de aprilo en Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo (Francio) kunsidis Eŭropa Esperanto-Unio (EEU); la 4an de majo en Bruselo (Belgio) okazis akcepto por kelkdeko da parlamentanoj kaj funkciuloj de Eŭropa Komunumo (EK).

La kunveno en Strasburgo arigis reprezentantojn de ses landaj asocioj, kiuj membras en Eŭropa Esperanto-Unio. Temis pri Britio (M.T. Austin, B. Barker), Francio (E. Ludwig), Italio (P.M. Tacconi), Luksemburgo (B. Moon, kiu ĉi-jare prezidas EEU), Nederlando (W.A. Verloren van Themaat) kaj Greklando (M. Pontika), kiu en Strasburgo aliĝis al la Unio. Ĉeestis ankaŭ Anne Tilmont, direktorino de Eŭropa Esperanto-Centro – sekretario de EEU –, kaj Grahame Leon-Smith, nome de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de UEA.

Ĉar Eŭropa Esperanto-Unio estas unu el tiuj ofte menciataj nomoj, kiuj tamen restas enigmo por la plimulto de niaj legantoj, ni provu loki ĝin en la nuntempa internacia Esperanto-movado. Ĝi estas (aŭ devus esti) kunordiga organizaĵo de la landaj asocioj en la dek landoj de Eŭropa Komunumo. Kvankam la iniciato pri ĝia fondiĝo aperis jam en la 62a UK en

Rejkjaviko (en 1977), kaj per la ĵusa aliĝo de Helena Esperanto-Asocio kompletigis la aliĝado de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj de la landoj de EK, la Unio estas ankoraŭ malproksime de firma establiĝo. Tio aparte koncernas la financajn rimedojn por ĝia funkciado. Dum la lastaj jaroj estis tiel, ke la plej granda parto de la rimedoj por Eŭropa Esperanto-Centro (EEC) venis de UEA, ĉu en la formo de subvencioj, ĉu en la formo de pagotaj fakturoj, tiel ke EEC nun estas unu el la grandaj debitoroj en la kontaro de UEA. La origina ideo estis, ke la financaj rimedoj de EEU venu de la landaj asocioj, kiuj konsistigas la Union. Montrigis, ke nur kelkaj el tiuj landaj organizaĵoj kontribuis per simbolaj sumoj, dum aliaj faris nenion ĉi-rilate.


Pro ĉio ĉi la financaj rimedoj por la funkciado de Eŭropa Esperanto-Centro kaj Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo (EPEG), fondita en oktobro pasintjare, estis unu el la ĉefaj temoj de la strasburga kunsido. Ŝajnas tamen, ke oni tie ne venis al aliaj esencaj ideoj ĉi-rilate, ol insiste peti ankaŭ estonte la necesajn financajn rimedojn el la buĝeto de UEA. Tia starpunkto evidencigas, ke oni facilanime supozas, ke ĉio internacia, eĉ se nur eŭropa aŭ nur okcidenteŭropa, devus nutri sin el la limigitaj financoj de UEA. Ni emas kredi, ke tiaj opinioj estas restaĵo de la malnova, eŭrocentrisma pensmaniero. Ni ne vidas kialojn, ke UEA trovu rimedojn por financi la parlamentan agadon en parto de Eŭropo, se ĝi ne sukcesas fari samon pri simila laboro en, ekzemple, Brazilo aŭ Ĉinio. Krome, estas sufiĉe absurde, ke UEA trovu



Dum la akcepto en Bruselo (de maldekstre): J. Catling, A. Tsirimokos, B. Moon, W. de Smet, B. Key, A. Tilmont kaj G. Maertens.

monon por tiel intensa – kaj certe utila – informa laboro inter la eŭropaj parlamentanoj, dum ĝi aliflanke ne trovas sufiĉan monon por financi la pioniran agadon pri la disvastigo de Esperanto en Afriko kaj Azio. Supozeble, la Komitato de UEA memoros ĉion ĉi kiam ĝi diskutos la venontajn buĝetojn de la Asocio.

La alia kunveno, tiu de la 4a de majo en Bruselo, havis la formon de akcepto por ĉ. 60 personoj, kiuj venis informiĝi pri la Internacia Lingvo dum neformala plurhora konversacio en unu el la bruselaj ejoj de Eŭropa Parlamento. Kiel invitanto rolis la eŭropa parlamentano Brian M. Key (Britio), kiu gastigis ankaŭ la fondkunvenon de EPEG en Strasburgo pasintjare. Li nuntempe montriĝas esti unu el la plej fervoraj apogantoj de Esperanto inter la eŭropaj politikistoj. La akcepton ĉeestis ankaŭ jenaj parlamentanoj: Glinne (Belgio), Seeler kaj Seibel-Emmerling (FR Germanio), Petersen (Danlando), Bernhard (Luksemburgo), Balfe, Enright, Collins, Lomas, Megahy kaj Seal (ĉiuj el Britio). Pluraj aliaj parlamentanoj sendis al la akcepto siajn kunlaborantojn. Ĉeestis, krome, kelkaj gravaj oficistoj de Eŭropa Komunumo kaj pluraj esperantistoj, kiuj laboras en eŭropaj instancoj: John Catling, Eliza Kehlet, Brian Moon, Angelos Tsirimokos. Venis ankaŭ la prezidanto de UEA G. Maertens, kiu malfermis la aranĝon, kaj pluraj aliaj funkciuloj de la internacia kaj belga Esperanto-movado. Regas ĝenerale opinio, ke



Forta subteno al Esperanto: Parlamentanoj Key kaj Seeler.

la akcepto montriĝis tre sukcesa kaj, ke ĝi certe helpos la estontan laboron por Esperanto en la kadro de Eŭropa Komunumo. Iuj parlamentanoj pretas disponigi al EEC servojn de siaj bruselaj oficejoj.

Estas klare, ke dum la lastaj jaroj okazas tre intensa informa laboro en la kadro de la eŭropaj instancoj. Tio nur aktualigas la demandon de firma starigo de Eŭropa Esperanto-Unio kaj ties sekretario en Bruselo. Sed tio estas unuavice tasko por la landaj asocioj en tiu parto de Eŭropo, kaj nur poste por UEA, kiu ne rajtas doni sian prioritatan atenton al la mondparto en kiu Esperanto havas plej firman pozicion.

S. Milojević

TURISMO

Okazos kadrokurso pri Esperanta turismo

Kun la celo ne nur utiligi Esperanton en turismo sed ankaŭ utiligi turismon por praktike informi pri la Internacia Lingvo (vidu pri tio ampleksan artikolon en nia aprila numero, p. 66), aktivuloj de Monda Turismo en Bruselo planas okazigi kadrokurson en la belga ĉefurbo, dum la semajnfino de la 17a kaj 18a de septembro ĉi-jare.

Kvin prelegoj traktos i.a. la planadon, ĉiĉeronadon, financon kaj lingvajn aspektojn de turismo. Notinde estas, ke la sabata aranĝo kun la prelegaro estos senpaga por la partoprenantoj, pro subvencio de la belga ŝtato. Simile, ankaŭ la aranĝoj de la dua kursotago estos senpagaj por la sukcesintoj en nedevisa ekzameno ligita al la kurso. Tiuj dimanĉaj aran-

ĝoj konsistos i.a. el studekskurso tra la delta regiono de Zelando (landlimo inter Belgio kaj Nederlando). La ekskursontoj vizitos ne nur la turismajn vidindaĵojn, sed konatiĝos ankaŭ kun la laboro de la Grafika Centro de UEA en Antverpeno kaj de la Centra Oficejo en Roterdamo. La prezo de la ekskurso estas 500 belgaj frankoj.

La organizantoj antaŭvidas allogajn premiojn por la plej sukcesaj partoprenantoj de la kadrokurso. Temos pri luksaj turismaj eldonaĵoj (disponigitaj de diverslandaj turismaj oficejoj pere de la bruselaj ambasadoj de tiuj landoj). La plej valoraj premioj konsistas el ok veturoj al la 9a Internacia Foiro de la Esperanto-Turismo, kiu okazos en Pollando, de la 21a ĝis la 30a de oktobro ĉi-jare. Tri el tiuj veturoj estos tute senpagaj, dum la aliaj kvin okazos kun 50-procenta rabato.

Por pliaj informoj pri la septembra kadrokurso skribu al: s-ro M. Demonty, Av. des Missionnaires 39, b.5, B-1080 Bruselo, Belgio.

La novembra kolokvo ĉe Unesko

Kvankam la sekva teksto atingis nin kun plurmonata prokrasto, ni ankoraŭ opinias, ke ĝi estas plene aktuala, precipe pro la fakto, ke ni ja troviĝas nur meze de la Monda Komunikajaro. Krome, la raporto de Emmanuel Chicot, multjara reprezentanto de UEA ĉe Unesko, bele ligiĝas ankaŭ al la ĉeftemo de la baldaŭa 68a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto.

Jam en marto 1979 okazis en Parizo, ĉe la sidejo de Unesko – sekve de iniciato de la reprezentantoj de UEA – kolokvo de la internaciaj neregistaraj organizoj (NROj) pri la "rajto je komunikado". Oni memoras, ke tio estis precize la temo de nia Universala Kongreso en Rejkjaviko en 1977, kie ni akceptis la ĝeneralan direktoron de Unesko, s-ron Amadou Mahtar M'Bow, kiu estis la ĉefa oratoro de la Solena Inaŭguro. La konkludoj de la kolokvo de 1979 jam emfazis, krom la neceson jure agnoski tiun novan rajton, la gravecon de la lingvaj obstakloj al komunikado kaj la tiurilatan utilecon de neŭtrala internacia lingvo.

Nova kolokvo, ĉi-foje pri "kultura komunikado", sur la kampo de televido kaj radio, okazis antaŭ kelkaj monatoj (de la 16a ĝis la 19a de novembro 1982), ĉiam en la kadro de la internaciaj neregistaraj organizoj, ĉe la sidejo de Unesko. Sed inter ambaŭ kolokvoj, la reprezentantoj de UEA ĉe Unesko efike agadis kunordigante laborgrupon pri "problemoj de komunikado", starigitan sekve de ilia propono, dum la konferenco de NROj en 1979. En junio 1981, tiu konferenco decidis pri nova kolokvo, kiun devis prepari kaj organizi la laborgrupo animata de UEA kaj kunordigi tri neregistaraj organizoj, inter kiuj UEA. Plie, Unesko konsentis finance helpi la kolokvon.

La preciza temo elektita estis "Kultura komunikado: la mesaĝoj de amaskomunikiloj (radio, televido)". Pri tiu temo, ĉiuj NROj (kategorioj A kaj B) ricevis, antaŭ la kolokvo, demandaron kiu entenis, interalie, laŭ sugesto de UEA, demandojn pri "dialogo inter kulturoj" kaj "lingvaj obstakloj al komunikado". Entute, 80 NROj respondis. Pri "dialogo inter kulturoj" multaj respondintoj emfazis la lingvajn malhelpojn al tiu dialogo. Traktante rekte la demandon pri "lingvaj obstakloj al komunikado", la plej multaj respondoj taksis tre gravaj tiujn barojn, sed la proponitaj rimedoj kaj solvoj estas tre diversaj. Kiel oni povis antaŭvidi, multaj ne eliris el multlingvismo. Tamen pluraj (neesperantistaj organizoj) konsideris serioze la eblecon uzi Esperanton kiel komunikilon.

Ni mem, je la nomo de UEA, atentigis pri la neceso stimuli, fare de Unesko, pli seriozan pristudadon de tiu problemo.

La unua parto de la kolokvo entenis, post la enkonduka parolado de reprezentanto de Unesko, analizan raporton pri la demandaro. Poste, altvaloraj internaciaj specialistoj (finlandano, usonano, bulgaro, svisoj, italo, francoj) prezentis diversajn aspektojn de "kultura komunikado", i.a. en rilato kun internacia interkonsento, protekto de kultura identeco, ebleco de publika kritiko pri televido kaj radio, elimino de stereotipoj, influo de teknikaj novaĵoj sur kulturo ktp. Ni tamen devas tute aparte substreki la paroladon de Claude Piron, profesoro ĉe Universitato de Ĝenevo, oficiale invitita de Unesko. Li unue analizis la problemojn kaŭzatajn de la subfosa influo, kiun la amaskomunikiloj (inkluzive de reklamado) efektivas sur la sentojn de etna kaj kultura identeco, prezentante modelojn, kiuj konfliktas kun la tradiciaj. Sed la ĉefa parto de lia interveno traktis la fenomenon de "universala kulturo", montrante ke nuntempe ĝi estas grandparte ligita al la angla lingvo, interalie pro la ekonomia potenco, mondscale, de la plurnaciaj entreprenoj, kiuj uzas preskaŭ ekskluzive tiun lingvon. La unuformigo de kulturo, kiu rezultas de tiu situacio, estas tre grava problemo.



Claude Piron
estas unu el la
plej kompetentaj
argumentantoj
por Esperanto.

Li kompare emfazis alian universalan kulturon: tiun ligitan al Esperanto, kiu certe koncernas pli diversajn popolojn, lingvojn, religiojn kaj pli multnombrajn sociajn tavolojn. Li montris, ke Esperanto praktike permesas efektivan interetnan komunikadon, integrante du identecojn, kaj samtempe helpas al protekto de tiuj etnaj kulturoj kaj de la respondaj lingvoj.

Multaj ĉeestantoj montris sian grandan intereson pri la prelego de Claude Piron, varme ĝin aplaŭdante, kaj tre certe multaj el ili unuafoje konsciis pri la taŭ-

geco de Esperanto kiel internacia komunikilo kaj kultura lingvo.

Entute, la tekstoj de la invititaj specialistoj estis tre interesaj kaj provokis viglajn intervenojn de la ĉeestantoj (demandoj, rimarkoj, komentoj). Fine, la kolokvo aprobis konkludojn, kiuj respondas al la diverseco de la esprimitaj opinioj kaj al la diversaj celoj kaj tendencoj en la neregistaraj organizoj. Tiuj konkludoj emfazas plurajn temojn, kiuj plejmulte respondas al la tradiciaj celoj kaj idealoj de Unesko: plifirmigo de la paco, disvolviĝo de la evoluantaj landoj (aparte koncerne alfabetigon), internacia kompreniĝo, protekto de la diversaj etnaj kulturoj kaj dialogo inter ili, respekto al homrajtoj kaj neceso fine krei kaj jure difini "rajton je komunikado". Sekve de UEA-propono, unu el la konkludoj ankaŭ konfirmas la neceson plustudi la lingvajn obstaklojn al komunikado.

Venos poste fina raporto, kiun espereble Unesko publikigos. Do entute, estos tri oficialaj dokumentoj pri la kolokvo: analizo de la demandaro, konkludoj kaj fina raporto, al kiu verŝajne estos aldonitaj ankaŭ la tekstoj de la prelegoj de la invititaj ekspertoj.

E. Chicot

Recenzoj

Grava orientazia vortaro

Korea-Esperanto Vortaro. Kompilis Hajpin Li. Seŭlo: Libera Biblioteko, 1983. 478p. 15cm. Prezo: 30,90 gld.

Jen la unua plenskala korea-Esperanta vortaro kun proksimume 38 000 kapvortoj inkl. de sufiĉe multaj fakterminoj. La aŭtoro Hajpin Li per ĝi kompletigas sian vortaran duopon: lia *Esperanta-korea vortaro* aperis en 1969.

Ĝis nun troviĝis nur mimeografia provkajero de alia aŭtoro, por esperantigi koreajn vortojn. Tial estis preskaŭ por miri, ke tamen aktivis multaj bonaj koreaj uzantoj de Esperanto. La recenzanto konas japanan aktivulinon, kiu longe deziris organizi plumamikaron inter japanoj kaj koreoj, tamen hezitis komenci tion, ĉar mankis taŭga esperantig-helpilo por ordinara koreaj esperantistoj. La kontribuo de ĉi tiu nova vortaro estos granda.

La vortaro malhavas uz-ekzemplojn. Bazaj vortoj, kiuj bezonus pli da linioj por vicigi diversajn eblajn tradukojn, estas traktitaj tro koncize. Ankaŭ la uzitaj litertipoj estas tro "miopigaj"; senhezite mi deklarus, ke neniu alia Esperanto-vortaro uzas pli malgrandajn literojn. Kiel lernovortaro ĝi do postrestas for de idealo. Sed unuavice gravas, ke koreoj nun havas tre bonan "indekson" por aliri la jam pretajn

internaciajn vortarojn (PV, PIV ktp). La tro oftaj prezeraroj signifus nenion, se uzanto de la vortaro sufiĉe konsultos ĝisdatajn leksikologiajn verkojn samtempe.

Verŝajne spegulante la tre fortan naciismon de Korea Respubliko (Sud-Koreio), la vortaro malhavas la kapvorton *Pjongjango* (la ĉefurbo de Nord-Koreio), kvankam enestas kapvortoj por *Moskvo* kaj *Pekingo* (devus esti *Pekino*!).

Ĉe la kapvorto *paduk* (goo), konkurencas du vortoj: *badugo* (el la korea) antaŭas la terminon *goo* (el la japana). Evidente, la aŭtoro demandis sin: Kial preni en Esperanton la japanan vorton anstataŭ nian karan korean? Certe la ludo *goo* (Pardonu, ke mi almenaŭ nun sekvas *PIV*on) ne estas inventaĵo de japanoj; do ĉinoj, la lud-inventintoj, siavice esperantigis ĝin *vejĉio*. Nu, oni povas aserti, ke jam la vorto *go* internaciigis (ja troviĝas en diversaj nacilingvaj vortaroj), ĉar estis japanoj, kiuj klopodis internaciigi la ludon mem. Koreoj siaflanke grumblas: Ĉu uzi *goo* anstataŭ *badugo*? Tio estas lingva diskriminacio!

Paradokse, ke Esperanto, senigilo de lingva diskriminacio, ne eviteble servas kiel ejo por lingvanaciisma kolokvo. Profesoro Gilsu So, aktiva korea esperantisto, prave opinias, ke devas stariĝi internacia komisiono el koreoj, ĉinoj, japanoj k.a. por decidi unuecajn esperantigojn por aferoj komune orientaziaj.

Ĉe la kapvorto *tubu* (tohuo, toŭfuo) staras nur: *fabkazeo*, eble por ne doni al Esperanto ankoraŭ alian sinonimon kore-devenan *dubuo*! Ĉe la kapvorto *toenjang* (*misoo*, japandevena vorto en *PIV*) estas nur *sojpasta saŭco*.

La aŭtoro prezentas sian landon *Koreio* aŭ *Koreujo* kaj ĝian loĝanton *koreano*. Ĉi-lasto devas esti *koreo*. *PIV* kaj multaj aliaj preferas la kombinon *Koreo – koreano*, kio ŝajnas absurda. Etnologio pravas, ke koreoj estas pli "pura" gento ol japanoj, kiuj estas sangomikso el ajnuoj (origina etno sur la japana arkipelago), polinezianoj kaj koreoj. Kial do japanoj ĝuu radikon popolnoman, dum koreoj "humiliĝu" per radiko regionnoma? La prefero de *Koreo – koreano* baziĝas sole sur eŭrocentrisma historia rigardo.

En la korea lingvo troviĝas pluraj latinig-sistemoj: tiu de McCune-Reischauer (Mekjun-Rajŝaŭer) kaj edukministreja. La unua estas pli fonetika kaj uzata de scienculoj tramonde; la duan fonemikan aprobas Hajpin Li.

Multaj koreaĵoj internaciigis laŭ la sistemo McCune-Raischauer (ekz. *kimch'i*, korea spicoriĉa legompeklaĵo), do sekvi ĝin estus pli konvene. Hajpin Li esperantigis la peklaĵon kiel *gimĉio* laŭ ĝia edukministreja literumo *gimchi*, sed *kimĉio* estus pli taŭga formo. La maltaŭgo de la Hajpin-a maniero evidentiĝas ĉe la monstra *makgeolio* (korea nefiltrita

rizvino); laŭ McCune-Raischauer la origina vorto literumiĝas *makkōlli*, do el tio Esperanta formo: *makolio*, pli ĉarma nomo por priebrii.


La ŝoka titolo *Korea-Esperanto* (anstataŭ *Korea-Esperanta*) *Vortaro*, konsternaj neologismoj kiel *kriticismo* (por *kritikado*), *dina* (por *minca*), kaj grafikaj malordaĵoj (precipe pri vortodivido) espereble estos forkorektitaj en la sekvanta eldono.

Yukio Izumi (Japanio)

Aperis kulture grava verko

La instruoj de Budho. Tôkyô: Bukkyo Dendo Kyokai, 1983. 310p. 19cm. Bind. ISBN 4 89237 029 0. Prezo: indikota.

Se la sankta libro de la budhanoj aperas en Esperanto pli malfrue ol eldoniĝis tiuj de la judoj, kristanoj kaj islamanoj, la kulpo estas atribuebla ne sole al la budhanoj-esperantistoj.



La Biblio aŭ Korano enhavas dekojn da libroj, kiuj estis skribitaj, laŭkrede, sub la gvido de Dio, kaj do konsistigas nedivideblan tuton. Dume la sanktaj libroj de la budhanoj nombras kelkmil, kaj ili konsistas el paroladoj de Budho, komentoj de postaj gvidantoj, kaj reguloj de la Budha Frataro. Ili kune okupas centon da volumoj, kaj al ĉiu el ili diversaj sektoj atribuas diversajn valorojn.

Krome, almenaŭ en Japanio, la sanktaj libroj estis konservitaj en la antikva ĉina lingvo, tiel ke ili restis por laikoj nur volapukaĵo. En la lastaj jardekoj komenciĝis movado por disvastigi ilin en pli alirebla formo, sed tiel ke la esenco de la budhismo tamen estu sufiĉe prezentita. Tiel unuafoje la instruoj de Budho komencis familiariĝi al la japanaj laikoj. Estas nature, ke oni baldaŭ entreprenis la tradukadon de tiu unuvoluma prezento en diversajn lingvojn, por disvastigi la orientan religion tra la mondo.

Fine, jen estas Esperanta versio, kiu estas ellaborita – kaj enhave kaj forme (bela bindo) – laŭ la normoj de Budhisma Misia Fonduso, kiu jam eldonis similajn versiojn en dek lingvoj. La enhavon prizorgis eminentaj specialistoj, por ke estu klare, kio estas *iluminiĝo* (stato de la animo libera de ĉiuj vulgaraj pasioj) kaj kiel ĝi estas atingebla.

La teksto de la libro konsistas el kvar partoj: *Budho* (la vivo de Budho; koncepto pri Budho laŭ postaj kredoj); *Darmo* (t.e. la instruoj); *La vojo de purigado* (pli praktikaj instrukcioj); *Frataro* (la ordeno de la eklezio). La dua kaj la tria partoj formas la kernon de la libro. La teksto estas kompilaĵo de ekstraktoj el diversaj libroj, kio estis necesa procedo. Ĉar ekzistas multaj sektoj, manlibro de ĉi tiu speco devas havi ian "ekumenan" karakteron. Certe, elementoj de la prabudhismo pli viglas ol oni atendus en Japanio, kie tradicie floris nur mahajanaj sektoj (t.e. postaj kaj reformemaj skoloj, kiuj emas peti helpon de la Supera Budho). Kvankam mi sentis kelkfoje nekohercon inter la teravadaj (pli proksimaj al tiuj de la prabudhismo) kaj la mahajanaj elementoj, la kvietiga instruoj de Budho estas, ĝenerale, bone redonita en la elekto kaj aranĝo de la eltiraĵoj. Tiurilate, ekzemple, la ĉapitro "La savo de Budho" (p. 102-113) ŝajnas fremda fronte al la najbaraj ĉapitroj, pro la troa mahajaneco.

La tekston sekvas, krom indiko de la fontoj, aldonaĵoj: "Konciza historio de budhismo", "Disvastiĝo de Budha instruoj", glosaro, ekstrakto el *Darmapado* (unu el la plej malnovaj kaj plej konataj sutroj) ktp. Ili mem estas bonaj legaĵoj por sciigi pri la eksteraj aspektoj de budhismo, kaj por resumi la instruon.

Bedaŭrinda estas la svarmo de ĉiuspecaj lingvaj mankoj kaj eraroj tra la tuta volumo, precipe en la unuaj partoj kaj la suplemento. Kompreneble, multaj estas simplaj preleraroj kaj gramatikaj eraroj, facile korekteblaj dum la legado. Sed troviĝas ankaŭ miselekto de vortoj, malbona frazkonstruo kaj fuŝa traduko, kiuj nebuligas, obskurigas aŭ eĉ tordas la enhavon. La uzo de la vorto *asketismo* (p. 195) estas fatala. Se la tradukinto estus konsultinta *PIV* sub la vorto *asketo*! Almenaŭ unu vorto (*oreloj*, p. 116, komence de la antaŭlasta linio), unu frazparto (p. 119, l. 9) kaj unu paragrafo (p. 188, inter la tria kaj la kvara paragrafoj) restas netradukitaj. Legu estas

anstataŭ *kaj* (p.76, l.12), *rezonado* anstataŭ *racio* (p.81, l.13), *puso* anstataŭ *puno* (p.83, l.7), *kvin* anstataŭ *kvar* (p.118, l.4), *pentoj* anstataŭ *sentoj* (p.119, l. -1), *insultojn* anstataŭ *instruojn* (p.123, l.3), *permesi* anstataŭ *promesi* (p.159, l. -6.), *nenio* *restas senŝanĝa* anstataŭ *restas nenio ŝanĝigema* (p.168, l.3).

Kredeble kelkaj el la tradukintoj estis ne sufiĉe kompetentaj por entrepreni la tradukadon. Sed se la redaktoro estus pli atentema, la malbonkvalita lingvaĵo estus multe malpli ofta. Nu, la historio de la japana kaj la angla versioj jam montris, ke necesas longa tempo por perfektigi la tekston. Ni atendu la samon por la Esperanta versio.

Malgraŭ ĉio ĉi, restas vere, ke la apero de *La instruoj de Budho* estas grava kultura dato en la historio de Esperanto. Ĝis nun ni havis nur malriĉan provizon da budhisma literaturo. Ĝi impresis des pli malriĉe kompare kun tiuj de aliaj du grandaj religioj, kaj eĉ pli se ni konsideris la nombrojn de la kredantoj de tiuj tri religioj inter la esperantistaro. Nun ni povas diri, ke la breĉo estas grandparte ŝtopita.

Ĉu mi ŝajnus esti tro malrealisma, se mi esperus, ke oni baldaŭ publikigos ĝeneralan enkondukan libron pri budhismo, kiu formus la bezonatan paron kun ĉi tiu grava volumo.

Hitosi Gotoo (Japanio)

Zamenhofologia leteraro

Korespondajo ludovikologia. Kyôto: Eld. Ludovikito, 1982. 288p. Ilus. 22cm. Kromkajero 2. Prezo: 33,00 gld.

Korespondajo ludovikologia estas duparta. La unua parto enhavas la kompletan korespondadon inter Ludovikito kaj Naftali Cvi Maimon de 1974 ĝis 1979, la dua parto tiun inter Ludovikito kaj Gaston Waringhien de 1976 ĝis 1981. Tiuj tri homoj, Ludovikito, Maimon kaj Waringhien, konsistigas vere admirindan laborteamon. Unu demandas, demandadas, ĉiam denove demandadas, kaj la du aliaj ne laciĝas respondi. Kun vere neelĉerpebla pacienco ili klopodadas atingi, eltrovi, elfosi kaj havigi al la vorema sciemulo la plej eble ĝustajn respondojn. Ofte ili mem siaflanke devas skribi, demandi, telefonadi por klarigoj, devas viziti bibliotekojn, foliumi la koncernan literaturon aŭ havigi al si rarajn dokumentojn per fotokopiado. Ĉiam Ludovikito estas la instiganto, la stimulant, kies avida laboremo almetas al la materialo de li jam kolektita la materialon, kiun liveras la du aliaj, por konstrui, kiel diras Gaston Waringhien, citante Horacion, "al la Majstro la plej belegan monumenton ol ĉia bronz' pli daŭran!".

Tre ofte Ludovikito submetas al siaj nenion supozantaj kunlaborantoj – iom ruze al ĉiu aparte – la

samajn demandojn. Iliaj respondoj, kompreneble, tre ofte ne identas. Kaj li, kiu jam karaktere ŝajnas esti skeptikulo, devas nun pli ol antaŭe pripensi, kombini, kompari, konjekti, ĉiam ĉasante la arde aspirantan veron.

Apud la precipaj temoj, kiuj preskaŭ ekskluzive koncernas Zamenhof, troviĝas aliaj malpli gravaj: marĝenaj dankesprimoj, demandoj pri sano aŭ bona farto, klarigoj pri la cirkonstancoj de iu sendaĵo aŭ pri iom longa silentado. Sed ankaŭ ili apartenas al la korespondaĵo, faras ĝin homeca, kaj ĝiaj skribantoj fariĝas niaj intimaj konatoj, ja iel samideanaj, tre ŝatindaj amikoj.

Rikardo Ŝulco (FR Germanio)

Agrabla legaĵo

Kapricaj raketoj, de Carmel Mallia (1929). Zabbar (Malto): La aŭtoro, 1981. 46p. 14cm. Prezo: 6,60 gld.

La broŝuro entenas tre subjektivajn impresojn, kiel konfesas la aŭtoro: "gutoj verŝitaj el lia pens- kaj koroputo". Ĝi do pritraktas temojn tiel diversajn kiel diversaj estas la pensoj de la homa intelekto kaj la sentoj de la homa animo. Jen en la fokuso staras nia destino, jen la naturo, alifoje amo kaj amoro. Kelkie travideblas bona humoro, kiel en la kvarverso: *Elokventa elizio:/minijupo umbilika;/Ĉu feliĉa situacio?/Embaras' publika*. Sed plejofte Mallia filozofas: *Ŝpi-niĝas homa penso / galaksie, / Taga sterniĝo ĉe la nokta sin': / Ĉu spegula vizi' de la mondfin'?* Kelkaj poemetoj volas alpreni la kondensecon de hajko, tamen anstataŭigante ties regulsilaban poeziecon per versfinaj rimoj. Kvankam facilflua kaj lingve altnivela, enŝoviĝis kelkaj neortodoksaĵoj ŝuldataj al naci-lingva influo, kiel *demandi* (peti, postuli), *prostituti* kaj *respiri*. Entute agrabla legaĵo, kiun oni povas konservi, por iam kaj tiam ĝin tralegi kun renovigita plezuro.

L.H. Knoedt (Brazilo)

Aktuala, densa informaro

Esperanto und Wissenschaft (Zur Plansprachenproblematik), de Detlev Blanke (kunlabore kun T. Dahlenburg kaj M. Schüler). Berlin: Kulturbund der DDR/Esperanto-Verband, 1982. 88p. 21cm. Prezo: 12,00 gld.

Detlev Blanke estas unu el la plej aktivaj verkan- toj de sciencaj studoj pri interlingvistiko en ekster- movadaj publikaĵoj. Jen li prezentas al sciencistoj kaj interesitoj pri la fako koncizan, sed informriĉan ski- zon de la interlingvistiko kaj ĝia ĉefobjekto Esper- anto.

Blanke trarigardas la nedisvastiĝintajn planlingvajn projektojn kaj skizas la internacilingvan sciencon kaj ĝiajn centrojn. Prezentiĝas la strukturo de Esperanto, ĝiaj praktika uzado kaj pedagogia valoro. Analizinte la uzadon de lingvoj en scienco kaj tekniko, Blanke priskribas la tiukampan rolon de Esperanto, aparte akcentante la provizon de faktermoj. Ĉi tiun ĉapitron komplementas prezento de fakaj revuoj, organizaĵoj kaj konferencoj utiligantaj Esperanton, esenca bibliografio pri fakaj vortaroj kaj periodaĵoj kaj rigardo al Esperanto en komputado. Fine aperas specimenaj Esperantaj faktekstoj.

Verkante en la germana, Blanke alparolas nemo-vadanojn. Tiuj ĉi-teme nun apenaŭ povas trovi pli aktualan, multdetalan kaj densan informaron. Por movadanoj kompreneble ne ĉio estas novaĵo, tamen indas studi la libron jam pro la abundaj kaj ĝisdataj bibliografiaj indikoj. La libro invitas plustudi.

Klaus Schubert (FR Germanio)



Akademijaj studoj 1983. Red. Rüdiger Eichholz (1922). Bailieboro: Esperanto Press, 1983. 208p. 29cm. Mimeo. Represo de diversloke aperintaj artikoloj kaj studoj pri telekomunika/komputila alfabeto, komputila traktado de Esperanto-teksto, seksa diskriminacio en la lingvo, kemia nomenklatur, landonomoj ktp. Prezo: 27,00 gld.

Curso elemental de Esperanto, R. kaj J. Scolnik. Cordoba: Eld. ne indikita, 1982 (2a eld.). 119p. 19cm. Elementa lernolibro, kun ekzercoj, legaĵoj kaj vortareto. Prezo: 10,80 gld.

10a listo de gastigantoj 1983, Pasporta Servo de TEJO. Hamburg: TEJO, 1983. 52p. Mapoj. 21cm. La plej lasta listo de gastigantoj, kiu ampleksas 561 adresojn el 50 landoj. Prezo: 6,90 gld.

Deutsche Redensarten in Esperanto (1922), Karl Minor (1891-1946). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 51p. 21cm. Germana-Esperanta esprimaro laŭ la proverbaro Esperanta de L.L. Zamenhof. Prezo: 8,10 gld.

Espéranto au service des Nations Unies, L', Humphrey Tonkin. Rotterdam: UEA, 1983. 20p. 21cm. Documents sur l'espéranto, 14F (1983). ISSN 0165-2621. Franclingva dokumento pri Esperanto en la servo de Unuiĝintaj Nacioj, kun bibliografio. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto-Schnell-Kurs, Hans Koch. Brasschaat: TK/Stafeto, 1983. 101p. 15cm. ISBN 90 6336 030 4. Ankaŭ samnoma kaseto kun ĉiuj Esperantaj tekstoj. Prezo de kompleto: 24,00 gld.

Feliĉaj kaj simplaj, Waldo Vieira. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1982. 114p. Ilus. 18cm. Mallongaj instruaj rakontoj laŭ la spiritismo. Prezo: 4,20 gld.

Fihonestulo; Rakontoj, Tyburcjusz Tyblewski. Jelenia Góra: la aŭtoro, 1983. 106 + 95p. Ilus. 20cm. Dulingva rakontaro Esperanto-pola, kun artikoloj kaj bibliografieto de tradukoj el la pola. Prezo: 24,00 gld.

Gvido de vojaĝo al eksterlando por esperantistoj, Krizantemo (Kazuko Kikusima). Japanlingva. Eldonloko neindikita: Japana Esperanta Librokooperativo, 1982. 11p. Ilus. 18cm. Manlibro kun ampleksaj informoj por japanaj esperantistoj, kiuj unuafoje vojaĝos eksterlanden. Prezo: 10,80 gld.

Humuraĵoj de malnova Japanio. El la japana tradukis Kijohiko Baba k.a. Tokio: Suginami-Esperanto-Rondo, 1982 (2a eld.). 51p. 15cm. Mallongaj humuraĵoj, verkita en la dua duono de la 18a jarcento. Prezo: 9,00 gld.

Infanmanĝulo, La, A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1983. 71p. Mimeo. 18cm. Komedia teatraĵo por infanoj. Prezo: 6,90 gld.

Informa libreto 1983-84. Sofia: Bulgara Esperantista Asocio, 1982. 76p. 15cm. Informlibreto pri BEA kun priskribo de ĝia historio kaj strukturo, listoj de ĝiaj funkciuloj, Esperanto-societoj en la lando ktp. Prezo: 3,60 gld.

Jakobo B. de Mole, A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1983. 55p. ilus. Mimeo. 17cm. La aŭtoro priskribas la abolicon de la Ordeno de la Kavaliroj de la Templo fare de papo Klemento en 1312. Prezo: 6,00 gld.

Japaneskoj; Poemaro originale verkita en Esperanto, Edwin de Kock (1930). Pyramid (Sud-Afriko): La aŭtoro, 1982. 114p. 19cm. Unu el la plej signifaj nuntempaj poetoj de Esperanto sukcese eksperimentas pri la japana metriko en hajkoj, utaoj kaj longutaoj. Prezo: 13,20 gld.

Kaj la ceter' – nur literaturo, Gaston Waringhien (1901). Antwerpen/La Laguna: TK/Stafeto, 1983. 350p. 21cm. Esperantologiaj eseoj 5. ISBN 90 6336 031 2. La kvina volumo de eseoj pri literaturo, literaturistoj, tradukado, arto k.a. Prezo: 39, 60 gld.

Luda kajero de LUDAKA, Eckhard Bick. Bonn: LUDAKA, 1983. 145p. Mimeo. 15cm. Foliaro pri 145 ludoj lingvaj, grupaj, cerbaj, dinamikaj ktp. Eblas mem ordigi la foliojn laŭ propra deziro. Prezo: 13,50 gld.

Memoraĵoj, A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1979. 50p. Ilus. Mimeo. 18cm. Rememoroj pri la infanaroj de la aŭtoro. Prezo: 4,20 gld.

Nuevo metodo de esperanto para clases y autodidactas, F. de Diego. Madrid: Heroldo de Esperanto, 1982. 214p. 20cm. Moderna lernolibro, kun multaj ekzercoj, legaĵoj kaj aldonoj; verkita en la formo de 10 viglaj dialogoj. Prezo: 15,90 gld.

Osnovy interlingvistiki, S.H. Kuznecov. Moskva: Universitato Lumumba, 1982. 108p. 22cm. Oficiala, universitata gvidlibro ruslingva pri la fundamentoj de interlingvistiko. Ĝi amplekse traktas Volapukon kaj Esperanton. Prezo: 15,00 gld.

Pri problemo de internaciigo de science-teknika terminaro (1935). Ernest Drezen (1892-1937). El la rusa tradukis A. Samojlenko. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 92p. 21cm. Represo de raporto, akceptita de la Komisiono por Teknika Terminologio ĉe la Sovetunia Akademio de Sciencoj en 1934. Kun indeksoj, kaj postparolo de Alfred Warner. Prezo: 18,00 gld.

Sciencaj komunikaĵoj 1982. Budapest: Scienca Eldoncentro de UEA, 1983. 66p. Ilus. 25cm. HU-ISSN 0133 1027. Diversstemaj sciencaj artikoloj pri medicino, arkeologio k.a. Prezo: 6,00 gld.

60 jaroj de Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj, Ju.V. Andropov. Moskva: APN, 1983. 24p. 17cm. Oficiala parolado. Prezo: 2,40 gld.

Situation officielle de l'enseignement de l'espéranto dans le monde, Germain Pirlot. Rotterdam: UEA, 1982. 24p. 21cm. Documents sur l'espéranto, 11F (1982). ISSN 0165-2621. Franclingva broŝuro pri la oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo. Prezo: 3,00 gld.

Suplementaro de fundamenta leksikono Esperanta, Parto 1; Tabeloj, listoj, mallongigoj k.a., Masao Hukuta. Tôkyô: Asake-Syoboo, 1982. 136p. Ilus. 26cm. Komparoj inter diversaj skribsistemoj kaj mallongigoj. Prezo: 12,00 gld.

Tajpada terminaro; Suplementaro de fundamenta leksikono Esperanta, aparta suplemento de la parto 1, Masao Hukuta. Tôkyô: Asake-Syoboo, 1982. 276p. Ilus. 25cm. Terminaro pri tajpado en la angla, japana kaj Esperanto. Prezo: 15,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20%, por la mendoj super 200 guldenoj – 10%. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

Ferioj en Insulo de Juneco

Apud la meza parto de la adria marbordo (Jugoslavio), proksime al la urbo Ŝibenik (tie troviĝas ankaŭ la antaŭe multkonata movada feriejo Primoŝteno) situas la insulo Oboljan. Ĝi estas bela, neloĝata insulo, ĉirkaŭata de tuta aro da aliaj insuloj kaj insuletoj kaj de la varma kaj pura Adria maro. La jugoslavia junularo tra la pasintaj jaroj organizis plurajn laborbrigadojn, kiuj adaptis la insulon por gastigi du mil gejunulojn samtempe. Tiu adapto provis ne tuŝi la naturbelaĵojn de la insulo, sed nur provizi la lokon per modernaj ekipaĵoj kaj vojetoj, por ke tie eblu starigi gigantan tendumejon. Pro ĉio ĉi, Oboljan ricevis la kromnomon "Insulo de Juneco".

Ĉi-jare, unuafoje eblas, ke ankaŭ junaj geesperantistoj feriu en la Insulo de Juneco. Internacia Kultura Servo (Amruŝeva 5, 41000 Zagreb, Jugoslavio) rezervis en Oboljan 80 lokojn en dulitaj tendoj, por la periodo de la 8a ĝis la 18a aŭgusto 1983. La prezo, kiu inkluzivas la restadon kaj kvar manĝojn tage, estas 190 guldenoj. Vi povas pagi la ekvivalenton de tiu sumo pere de UEA en Roterdamo, kun nepra indiko: "por la konto ikse-d". Samtempe necesas sendi aliĝleteron kaj informon pri la farita pago al la adreso de IKS en Zagrebo.

Kvankam ja temas esence pri feriado, kiun ĉiu organizas laŭ sia plaĉo (tamen, kun respekto de la ĝenerala ordo en la tendaro), eblas dum tiuj dek tagoj ĉeesti prelegojn kaj diskutojn pri marprotektado, spekti filmojn, ĝui koncertojn, fari ekskursojn ktp. Diligentuloj povus partopreni en unu el la diversaj kursoj (radioamatora, fotografa ktp). Eventuala malavantaĝo por kelkiuj estas la fakto, ke sur la insulo estas malpermesite konsumi alkoholaĵojn, kun escepto de la biero.

Kompreneble, samtempe kun la esperantistoj sur la insulo ferios ankaŭ multaj centoj da aliaj jugoslaviaj kaj eksterlandaj gejunuloj, kiuj verŝajne montros sufiĉan scivolon pri Esperanto.

39a IJK estos amasa!

La 39a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, de la 23a ĝis la 30a de julio, en Debrecen (Hungario), jam havas preskaŭ 500 aliĝintojn. Kiel kutime ĉe la TEJO-kongresoj, lastmomente ankoraŭ aliĝos pluraj partoprenantoj, tiel ke la kongreso certe viciĝos inter la plej grandaj en la ĝisnuna historio de la junulara

sekcio de UEA. Tion oni ne atendis pri la ĉi-jara TEJO-kongreso, ĉefe pro la fakto, ke ĝiaj preparlaboroj komenciĝis tre malfrue kaj ankaŭ nia revuo povis nur komence de 1983 anonci la unuajn informojn pri la 39a IJK. Cetere, la kongreso povus montriĝi ankaŭ tre signifa por la estonta agado de TEJO. Krom la fakto, ke tie okazos novaj elektoj por la gvidorganoj de TEJO, oni multon atendas de la dialogo inter la eŭropaj oriento (tie vivas la plimulto de la movadaj gejunuloj) kaj okcidento (kie troviĝas la sidejo kaj okazas la ĉefa aktiveco).

Britoj en Pollando

Junularo Esperantista Brita jam duafoje aranĝas vojaĝon al Pollando. Ĝi okazos de la 6a ĝis la 20a de aŭgusto ĉi-jare, tuj post la grandaj movadaj kongresoj en Hungario. Ni informiĝis, ke temas pri kontrakto, kiun subskribis la brita junulara sekcio kaj Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK), kun la celo interŝanĝi grupvizitojn. Polaj gejunuloj vizitos grupe Brition venontjare, okaze de la 40a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Swanwick.

La brita grupo, al kiu ĝis nun aliĝis deko da gejunuloj, vizitos plurajn regionojn de Pollando, inkluzive de Varsovio, Gdansko kaj Krakovo, kaj partoprenos i.a. 4-tagan someran renkontiĝon de PSEK.

Pasporta Servo de TEJO jubileas!

La 10a listo
de gastigantoj
de la



FREMURA

Pasporta Servo de TEJO

aperis por 1983.

Ĝi donas 561 adresojn en 50 landoj, kie senpage aŭ malmultekoste tranokti. La nova eldono prezentas pli da adresoj ol kiam ajn antaŭe, ĝi krome unuafoje inkluzivas mapojn. Kaj la prezo estas rekorde malalta! Pro tio, membroj de TEJO ĉi-jare ne ĝuas rabaton. La libreto (kaj la rajto uzi la servon) kostas 6 germanajn markojn inkluzive sendokostojn (aŭ 5 irpk) de HAPS, p/a Germana Esperanto-Junularo, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1. La pagon vi povas ĝiri al GEJ ĉe konto 337 17-201 (Hamburgo). Ĝi estas aĉetebla ankaŭ ĉe multaj landaj perantoj, kaj de la libroservo de UEA (prezo 6,90 gld. sen sendokostoj).

MARCEL GÉNERMONT (1891-1983), mortis en Moulins-sur-Allier, Francio, fine de majo. Ŝtate diplomita arkitekto, li multe propagandis kaj instruis Esperanton, plejparte en Parizo, kie li fariĝis delegito de UEA jam en 1910. UEA elektis lin Honora Membro jam antaŭ la dua mondmilito. Ekde 1958 li estis dum multaj jaroj fakdelegito en Moulins. Li estis unu el niaj plej malnovaj membroj.



MASON STUTTARD (1903-1983), mortis subite la 1-an de majo en Britio. Li estis konata en la Movado kiel verkanto kaj tradukanto. En 1946 aperis ĉe Esperanto Publishing Co. en la libroserio "Epoko" lia *La virineto en bluo kaj aliaj rakontoj*. Ĝin oni ĉi-jare represis. Lia plej konata traduko *Morto de trajno* de F.W. Crofts aperis en 1948. En 1951 li posteniĝis ĉe UEA kiel la Konstanta

Kongresa Sekretario, ofico, kiun li plenumis dum kvin jaroj. Tiutempe li tradukis en Esperanton la biografian verkon *Tito de V. Dedijer*. En la jaro 1952 publikiĝis lia populara lernolibro por anglalingvanoj *The Esperanto Teacher*, kiu nun jam atingis sian kvinan eldonon.

CORNELIS B. ZONDERVAN (1899-1983), mortis la 19an de junio en Deventer, Nederlando. Li estis delegito de post 1950. Profesie instruisto, li eble estis plej konata pro sia lernolibro por nederlandlingvanoj *Esperanto leerboek* (1952), kiun li verkis kune kun W.J.A. Manders. Tiu lernolibro estas la plej populara Esperanto-lernilo en Nederlando kaj ĝi jam atingis sian kvinan eldonon.

WILLIAM P. SIMPSON (1911-1981), mortis la 21an de aŭgusto 1981 en Harrisburg, Pa., Usono. Li aktive instruis Esperanton en lokaj mezlernejoj kaj estis membro-subtenanto de UEA dum multaj jaroj.

JAMES A. DOMBROWSKI, forpasis en New Orleans, Usono, en majo ĉi-jare. Li estis membro de UEA de post 1966.

KAREL M. J. POUPEYE (1901-1983), forpasis la 10an de junio en Bruĝo, Belgio. Li estis honora vicprezidanto de Belga Esperanto-Federacio, prezidanto de Bruĝa Grupo Esperantista kaj delegito de UEA de post 1950.

● **Hinda Unio:** S-ro S.S. Pal, la ĉefa movada aktivulo en la bengala urbego Kalkato, antaŭ nelonge starigis novan Esperanto-kurson al kiu aliĝis pli ol 30 gelernantoj, kaj daŭre venas pliaj. Krome, s-ro Pal gvidas apartan kurson en Howrah, antaŭurbo de Kalkato. Grandan helpon donas la ekzisto de la baza lernolibro, *Vortlibro kun krokizo de gramatiko Esperanta*, kiun verkis s-ro Pal kaj eldonis UEA, pasintjare. Tamen, la novaj kursanoj volonte ricevas pliajn Esperantajn librojn kaj informilojn (precipe anglalingvajn), kiujn oni povas sendi al: S.S. Pal, 35/1 Swami Vibekananda Rd., Howrah-711 101, Hinda Unio.

● **Aŭstralio:** Laŭ *The Australian Esperantist* (marto 1983), Aŭstria Esperanto-Asocio planas eldoni antologion de aŭstria literaturo. Oni volas ligi la aperon de tiu Esperanta libro ne nur al la Centjara Jubileo en 1987 sed ankaŭ al la Ducentjara Jubileo de Aŭstralio (1988). AEA nomis specialan komisionon por la antologio (s-ro A. Towsey, 19 Market Street, Tahmoor, NSW 2573), kiu bonvenigus kunlaboron de kompetentaj anglalingvanoj.

● **Jugoslavio:** Laŭ lastatempa enketo, du trionoj de 35 Esperanto-societoj en la jugoslavia respubliko Kroatio ĝuas regulan financon subtenon de la diversaj sociaj instancoj. Pasintjare tiu financa helpo sumis ĉ. 30 000 guldenojn, kiom ricevis ankaŭ la respublika organizaĵo Kroatia Esperanto-Ligo. Dum iom pli ol unu jaro, en Kroatio oni vendis pli ol 3 500 lernolibrojn de Esperanto.

Loke

● **Germana DR:** Inter la 11a kaj 13a de marto okazis la tradicia Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo en Leipzig. Kulture altnivelan programon pri i.a. scienco, literaturo kaj la pacmovado ĉeestis 142 homoj el pluraj najbaraj landoj. Aldone okazis fakkunvenoj de medicinistoj, komputistoj, fervojistoj kaj pedagogoj.

● **Brazilo:** La 21an kaj 22an de majo okazis la 9a Renkontiĝo de Esperanto en San-Paŭlo, sub la patroneco de la ŝtata sekretario pri edukado kaj kulturo, prof. O.J. Fernandes. Oni debatis pri diskonigo de Esperanto, instrumaterialoj kaj jarcento de Esperanto.



● **Svedio:** Iom pli ol simpla "Esperantostrato" fariĝis la nove nomita *Esperantogatan* en Malmö, ĉar ĝi estas ankaŭ la finhaltejo de urba aŭtobusa linio.

● **Interlingvistiko:** Kiel oni povis konstati ankaŭ el la mencioj kaj raportoj en nia revuo, universitataj tezoj pri interlingvistiko aŭ rekte pri Esperanto fariĝas dum la lastaj jaroj ĉiam pli oftaj. S-ro Edward Symoens (Putsesteenweg 131/A, B-2180 Kalmthout, Belgio), aktivulo en la Komisiono pri Informado de UEA, opinias, ke estus tre utile sisteme katalogi la informojn pri tiuj studoj. Li jam listigis dudekon da tezoj el pli ol dek landoj. Tio sendube estas tre nekompleta listo. Estas tial dezirinde, ke ĉiu, kiu disponas pri ĉi-rilataj informoj turnu sin al s-ro Symoens, indikante almenaŭ jenajn detalojn: aŭtoro de la tezo, titolo, amplekso, eventuala publikigo de la verko ktp.

● **Muziko:** Fine de aprilo en Cournon d'Auvergne, Francio, oni planis aranĝi seminarion pri instruado de Esperanto per kantoj. Amplekse raportis pri Esperanto almenaŭ kvar radiostacioj kaj

pluraj lokaj kaj naciaj gazetoj. Kvan- kam ĉio ĉi ne donis sufiĉan rezulton por sukcesigi la seminarion mem, la aranĝintoj spertis, ke Esperantajn diskojn kaj kasetojn eblas vendi ankaŭ al neesperantistoj. Ili memorigas, ke multaj radiostacioj laŭpete disaŭdigas muzikaĵojn, tiel ke eblas senpage atentigi pri Esperanto.

● **Instruado.** En februaro ĉi-jare, 200 personoj lernis en eksperimenta, semajnfina kurso, aranĝita de Internacia Kultura Servo en Zagrebo (Jugoslavio). Oni celis esplori, ĉu eblas atingi bazan skrib- kaj parol-kapablon post nur ses lecionoj el la lernolibro, ellaborita laŭ la konata "Zagreba metodo", t.e. helpe de frekvencvortaro de parolata Esperanto (Vd. ankaŭ nian februaran n-ron). Aŭspicanto kaj informanto pri la kurso fariĝis la loka ĵurnalo *Večernji list* (400 000 ekz-roj tage). Partoprenis la eksperimenton ankaŭ grupoj de eksterlandanoj

kaj memlernantoj. Oni taksas la rezultojn de la kursoj surprize bonaj. Aparte surprizis, ke la memlernantoj atingis 20 ĝis 30-procente pli bonan rezulton, ol la aliaj! Oni nun konkludas, ke estas plej efike lerni Esperanton en zorge gvidata grupo de memlernantoj.

● **Aŭtomatigo:** Kiel konate, UEA dum kelkaj lastaj jaroj aŭtomatigas sian administradon en la Centra Oficejo en Roterdamo. Nun UEA planas ne nur la ampleksigon de sia komputila sistemo en la CO sed ankaŭ aĉeton de komputilo por sia Grafika Centro en Antverpeno. Similajn paŝojn al aŭtomatigo faras ankaŭ la landaj asocioj de UEA en Francio, Britio, FR Germanio kaj Usono. Pluraj aliaj movadaj instancoj jam de kelkaj jaroj ankaŭ utiligas komputilojn.

● **Turismo:** Okaze de la 17a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, inter la 14a kaj 22a de julio, en Sintra, la loka Komisiono por Turismo eldonis plenkoloran faldfolion pri la regiono. Interesitoj povas peti ĝin de: Comissão do Turismo de Sintra, P-2170 Sintra, Portugalio.



● **Ĵurnalismo:** Okaze de la unua datreveno de la morto de la elstara loka aktivulo kaj ĵurnalisto Ivan Flanjak, la klubo *Liberiga stelo* en Osijek, Jugoslavio, iniciatis tritagan konferencon pri *Ĵurnalismo kaj literatura kreado en Esperanto*. La aranĝon, kiun partoprenis ĉ. cent personoj el kvar landoj, subtenis kaj la urbo kaj Radio Osijek. Post la bona sukceso de la konferenco, oni nun celas aranĝi similan kunvenon en ĉiu dua aŭ tria jaro, invitante ankaŭ neesperantistojn.



● **Libroj:** En nia januara numero (p.17) aperis informo, ke la Libroservo de Japana Esperanto-Instituto vendas librojn por la sumo de pli ol dek milionoj da enoj jare. Por maljapanigi tiun sumon ni tiutempe ĝin transkalkulis al 100 000 guldenoj, sed nia kompostisto faris el tiuj cent nur dek mil! Ĝentilaj, kiaj ili ja estas, la japanoj ne sendis al ni protestleteron kaj postulon, ke ni korektu la eraron. Anstataŭe, venis de ili la supra bildo kaj jena teksto: "JEI vendis librojn por 104 298 guldenoj en 1982. Jen viciĝas mil titoloj en la oficejo, pogrande aĉetitaj de sesdek eldonejoj en- kaj eksterlandaj." Kiel konstateble, la Libroservo de JEI efektive estas serioza konkurenco al tiu de UEA.

● **Sporto:** Unuaj Mondaj Ludoj por Paco okazos de la 22a ĝis la 30a de julio ĉi-jare en Bellegarde/Valserine (Francio), organizataj de la samnoma institucio. La celo estas kunigi homojn el ĉiuj mondpartoj, por kune vivi kaj sportumi (ĉi-jare temas pri 20-kilometra arbara marŝado), por krei la etoson de amikeco kaj toleremo, por montri ke eblas paca kunvivado de la popoloj. Aliĝojn (eblajn por ĉiu ekde la aĝo de 16 jaroj) bonvolu sendi al s-ino Michela Lipari, via C. Tivaroni 5/b, I-00143 Roma, Italio, por provo laŭeble kunmeti esperantistan teamon.

● **Hujucz:** Antaŭ nelonge, s-ro Hujucz, prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, estas elektita por la funkcio de vicprezidanto de Tutlanda Popola Kongreso (la ĉina parlamento). Hujucz estas unu el la pioniroj kaj ĉefaj aktivuloj por Esperanto en Ĉinio dum la lastaj ses jardekoj. Li iniciatis la fondon de Ŝanhaja Esperanto-Asocio en 1919, kompilis serion da lernolibroj por koresponda Esperanto-kurso kaj siatempe verkis la

● **Teatro:** Julian Modest (pseŭdonimo de la bulgara esperantisto Georgi Mihal-kov, kiu jam de pluraj jaroj vivas en Budapeŝto) verkis teatraĵon pri la vivo de Lidja Zamenhof, la plej juna kaj movade plej aktiva infano de Zamenhof. *Ni vivos*, tio estas la titolo de la dramo, prezentiĝos dum la 68a UK en Budapeŝto. Kvankam la nomo de J. Modest estas relative nova en la Esperanta literaturo, liaj eseoj kaj noveloj jam aperis en pluraj movadaj periodaĵoj (*Monato*, *Fonto*, *Hungara vivo*, *Oomoto* ktp).

● **Turismo:** Pro la baldaŭaj Esperanto-kongresoj en Hungario, la ŝtata Turisma Informservo utiligas ankaŭ Esperanton kiel sian laborlingvon ĉi-jare. Vi povas voki el Hungario aŭ el eksterlando la budapeŝtan telefonnumeron (1) 179 800, kaj peti informojn pri vojaĝo, ripozlokoj, turismaj programoj ktp. Eblas ankaŭ surloke en Budapeŝto (u. Petőfi Sándor 17/19, H-1052 Budapest) persone viziti la oficejon kaj peti informojn en la Internacia Lingvo. La telefonnumero estas uzebla de la 7a matene ĝis la 9a vespere en labortagoj, de la 7a ĝis la 20a sabate, kaj de la 8a ĝis la 13a horo dimanĉe.

Persone

ĉinlingvan broŝuron *40-jara jubileo de Esperanto*, kiu unufoje detale konigis Esperanton kaj la Esperanto-movadon al la ĉina publiko. Ankaŭ alia elstara ĉina esperantisto promociiĝis lastatempe: Bakin, vicprezidanto de ĈEL kaj membro de Honora Patrona Komitato de UEA, fariĝis vicprezidanto de Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, kiu verŝajne estas, post la parlamento, la plej grava politika instanco en

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

Konvinki iun pri Esperanto? Unu ekzemplero de MONATO valoras pli ol parolado! S. Nagy

MONATO estas la alternativa revuo, ĉiuaspekte. 40 paĝoj, riĉe ilustrita.


Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).



la lando. Krome, dum sia antaŭnelonga vizito al Ĉinio, la franca prezidanto Mitterrand transdonis al Bakin la ordenon de Honora Legio.

● **Sadler:** D-ro Victor Sadler, antaŭa ĝenerala direktoro de UEA, komence de junio forvojaĝis al Brazilo, kie li volus resti dum unu aŭ du jaroj, por "ripozi kaj movadumi", kiel li mem ĵus skribis al ni. Sadler partoprenos la 16an Brazilan Seminarion de Esperanto (kvazaŭ nacia Esperanto-kongreso, la plej granda movada renkontiĝo en la lando) en Ouro Preto, de la 21a ĝis la 24a de julio ĉi-jare. Post la Seminario li planas plursemajnan turneon, dum kiu li gastprelegos en kiel eble plej multaj Esperanto-kluboĵ tra la tuta Brazilo.

● **Ejsmont:** Antaŭ iom da tempo doktoriĝis Tadeusz Ejsmont (sur la foto) per sia disertacio "Edukaj funkcioj de



Esperanto kaj ĝia movado dum la periodo 1956-1980: Aspektoj pola kaj internacia", ĉe la Filozofia Fakultato de la Universitato de Lodzo, Pollando.

Oficiala Informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Britio: Alan Murray Hall. Hungario: Csaba Skékely. Japanio: Teruo Nakada.

DONACOJ 1983 (Gld.) ĝis la 30a de junio

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Anonime 1 250,00. Jugoslavio: B. Milićević 30,40. Nederlando: H. Bakker (patro) 300,00; I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00; W.A. Verloren van Themaat 25,00; S.A.K. v.d. Zee 25,00; G. Takens-Bakker 25,00; R. Moerbeek 100,00. Diversaj malgrandaj 11,05. Sumo ĉi-jara 3 318,00.

FONDAĴO CANUTO: Argentino: Amigos de Lopez Luna 18,00. Nederlando: H. Bakker (patro) 200,00. Anonime 1 250,00. Sumo ĉi-jara 3 394,40 gld.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: H.G. Strauss 41,93. Nov-Zelando: NZEA 36,40. Diversaj malgrandaj 16,85. Sumo ĉi-jara 3 355,29.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: J. v.d. Teems 20,00. Sumo ĉi-jara 60,00.

FONDAĴO TEJO: Nederlando: H. Bakker (patro) 100,00. Sumo ĉi-jara 208,02.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: R. Paintner-Trumpp 1 123,43. Sumo ĉi-jara 3 354,44.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA NOVAJ ĈEFDELEGITOJ EN BULGARIO, NEDERLANDO KAJ USONO

Nederlando havos ekde la 1-a de julio ĉi-jare novan ĉefdelegiton kaj kotizperanton. Temas pri la multjara UEA-komitano s-ro Tjerk Boersma, Hoeveeweg 18, 8394 VR De Hoeve. Li transprenas la laboron de s-ro W. Rodenhuis, kiu dum 12 jaroj modele plenumis tiun taskon. En Usono, la nova ĉefdelegito fariĝis s-ro William Harmon, antaŭa prezidanto de la landa asocio de UEA (p/a ELNA, P.O.Box 1129, El Cerrito, CA 94530). Li transprenas la taskon de s-ino Bonnie Helmuth, kiu dum pluraj jaroj estis ne nur la ĉefdelegito sed ankaŭ la kotizpe-

Pro ferioj, urĝaj kongresaj laboroj ktp. pluraj oficistoj de la CO de UEA ne estos en Roterdamo dum julio kaj aŭgusto. Kvankam la Oficejo ne estos fermita tiutempe, ĉiujn vizitojn bonvolu nepre antaŭanonci telefone (tel. 010/36 15 39) kaj skribu nur pri vere urĝaj aferoj. Antaŭdankon pro via kompreno!

ranto. Tamen, la kotizperado en Usono restos ĉe la oficejo de la landa asocio ELNA. Ankaŭ Bulgario spertas ŝanĝon de la ĉefdelegito. Retiriĝas s-ro Kunĉo Vâlev, kaj la taskojn transprenas s-ro Angel Todorov, Bul. Emil Markov, bl.37, vh.B, BG-1680 Sofia. Al ĉiuj tri retiriĝantaj ĉefdelegitoj UEA tre kore dankas pro la multjara fidela servo.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informon!

Ni trovas librojn, anglalingvajn, aliajn. Korespondpovaj, Esperante, angle: Libroj "PI", 1847 N. 2d, Milwaukee, Wisconsin 53212, Usono.

Esperantista Klubo, 31 rue Tréfilerie, F-42100 Saint-Etienne, festas sian 80an datrevenon. Dankon al ĉiuj, kiuj sendos salutkartojn.

Zdravka Metz kaj Normand Fleury ŝanĝis sian adreson. Nun validas: 6358 de Bordeaux, Montréal, QC, Kanado H2G 2R8.

Pri paca ekspozicio dum internacia simpozio respondecas Kanada Esperanto-Asocio, septembre en Montrealo. Ni petas infandeseĝojn lige al la temo "Paco". K.E.A. LF: 126, Stacio Beau-bien, Montréal, QC, Kanado H2G 3C8.

Kun samaĝa hungar(in)o pri diversaj temoj, precipe libroj kaj tablotenis, deziras korespondi 16-jara Pascal Riguelle, 112 Montagne St. Barbe, B-5100 Jambes, Belgio.

15-jara Christian Desmet deziras korespondi kun samaĝa knabino el Danlando, Svedio aŭ Bulgario: 5 Place de Villers, B-5842 Villers-lez-Heest, Belgio.

Urantia revelacio: pri tiu temo deziras korespondi Frederick Nietert, POB 1132 Douglas, AZ 85607, Usono.

La Libroservo de UEA

disponas pri kelkdeko da ekzempleroj de la baza bibliotekista manlibro

KLASIFO DE ESPERANTAJ TEMOJ de M.C. Butler

La 144-paĝa verko aperis en 1950 kaj delonge ne plu estis akirebla en la merkato.

Prezo: 30,00 (por Nederlando 31,20) gld., plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Por gesamideanoj (precipe virinoj), kies hobia estas brodado kaj alflikado:

LKK de la 69a Universala Kongreso en Van-kuvero, Kanado, serĉas kunlaborantojn por krei grandan albuman stebaĵon, kiu dum la kongresa semajno estos ornamaĵo de la kongresejo. Vian pretecon kunlabori bonvolu **ANONCI TUJ** al: Olga du Temple, 765 Braemar, Sidney, B.C. Kanado V8L 3S1. Ni sendos al vi detalan priskribon de la laboro kaj de la desegno.

Plurlingveco en Europo: ĉu obstaklo aŭ ponto?

Konferenco de la Eŭropa Klubo,
Bruselo, 27-31 aŭgusto 1983.

Vizitoj al Eŭropaj Instancoj, prelegoj, debatoj, distraĵoj, ekskursoj, kunsidoj,...

Por informoj:

Eŭropa Klubo, P.K. 3, B-1040 Bruselo 26.



LA ESPERANTO-TURISMO OFERTAS

- unikajn homajn interrilateblecojn
- 4 000 delegitojn en pli ol cent landoj
- 500 adresojn en 50 landoj, kie eblas esti senpage gastigata
- 500 internaciajn renkontiĝojn en 40 landoj, listigitajn en la *Turisma kalendaro*

- sian fak-organon = plej fruktodona ideobanko

- informkoverton: "Turismo nia bonŝanco" kontraŭ 2 IRK aŭ sendeviza egalvaloro

Informas: MONDA TURISMO
Montoyerstr. 37 b24
B-1040 Bruselo, Belgio



ampleksa faka kajero kontraŭ tre populara prezo!


Sciencaj Komunikaĵoj

Tiu ĉi libro eldonita de la Scienca Eldona Centro de UEA traktas interalie la jenajn temojn:

- **Pri la hungara spico-papriko**
(D-ino Gál Ilona)
- **Sur la spuroj de la prahistoria homo en Hungario**
(Bernard Golden)
- **Okupiga terapio en la infanhospitalo**
(D-ino Körmandy Györgyi)
- **Novaj evoluoj pri ciklotronoj en la teknologia universitato de Delft**
(Inĝ. Jan Otto de Kat)
- **ktp.**

sciencaj komunikaĵoj

1982



ELDONAĴO DE LA SCIENCA ELDONCENTRO DE UEA

Sciencaj komunikaĵoj 1982,
Redaktis D-ro inĝ. Haszpra
Ottó kaj inĝ. Lukács András.
Budapeŝto: Scienca Eldona
Centro de UEA, 1982. 66 p.
24cm. Prezo: 6 gld., plus sendo-
kostoj. Triona rabato ekde 3
ekzempleroj. Mendu ĉe la
libroservo de UEA.

Jen postmorte la vivoverko de la iama vic-prezidanto de la Akademio, elstara esperantologo.

Inter la temoj, kiujn traktas ĉi tiu kolekto de esperantologiaj eseoj troviĝas ankaŭ la jenaj:

- *Fonetiko de Esperanto*
- *Sinonimoj kaj homonimoj en Esperanto*
- *La arto traduki*
- *La elementoj de Esperanto, ĉu arbitre elpensitaj? ktp.*

La lingva esenco de Esperanto, de Atanas D. Atanasov (1892-1981). Rotterdam: UEA, 1983. 176 p., 21 cm. ISBN 92 9017 024 7. Prezo: 27,00 gld. plus sendkostoj.

Ĉi tio estas la unua ampleksa verko komplete prizorgita de la Grafika Centro de UEA. Sur luksa papero, kun eleganta kovrilo el plastumita kartono. Mendu ĉe la libroservo de UEA.

**ATANAS D.
ATANASOV**

**LA LINGVA
ESENCO DE
ESPERANTO**

UEA, ROTTERDAM, 1983

Post la originala *Hungara antologio* de 1933 nun fine aperis la nova, lukse bindita eldono de

Hungara antologio

"Tiu ĉi nova *Hungara antologio* pluetudas... la gamon prezentitan en la unua, kaj same entuziasme ni voras ĝin..."

William Auld

Pli ol 200 literaturaj pecoj de la plej famaj reprezentantoj de unu el la plej brilaj, sed ankoraŭ nesufiĉe konataj, literaturoj de Eŭropo. Kompilita kaj kun ampleksa enkonduko de Vilmos Benczik, la antologio estas inde bela kulturaĵo, per kiu festi la ĉi-jaran Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto.

Eld. Corvina Kiadó, 1983. 448 p., 24 cm. Bindita kun kvar-kolora kovrilo. ISBN 963 13 1625 4. Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Prezo: 57,00 (por Ned. 59,28) gld. plus sendkostoj.